

LA ONDO de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto



2011

1

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2011. №1 (195)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Peter Baláž, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Andrej Peĉonkin, Sergio Pokrovskij, Serge Sire, Andrzej Sochacki

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefono (4012) 656033

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2011

Internacia tarifo: 38 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 20 eŭroj

Ruslanda tarifo: 590 rubloj

Pollanda tarifo: 60 zlotoj

Aerpoŝta aldono: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj por ĉiuj landoj

Perantoj vidu la liston sur la 23a paĝo.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 600 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (3000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (1000 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (600 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 15 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kosta duoble. Triona rabato pro ripetito.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2011.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2011, №1 (195).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горещкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 13 декабря 2010 г.

Цена свободная. Тираж: 600 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.



Fotis Andrzej Sochacki

Katalin Kováts – la Esperantisto de la Jaro 2010

La Ondo de Esperanto iniciatis en 1998 ĉiujaran proklamon de la [Esperantisto de la Jaro](#). Al ĉi tiu projekto aliĝis reprezentantoj de diversaj tendencoj en la Esperanto-komunumo kaj sendependaj kompetentuloj.

La listo de la laŭreatoj

1998 William Auld (Skotlando)

1999 Kep Enderby (Aŭstralio)

2000 Hans Bakker (Nederlando)

Mauro La Torre (Italio)

Jouko Lindstedt (Finnlando)

2001 Osmo Buller (Finnlando/Nederlando)

2002 Michel Duc Goninaz (Francio)

2003 Dafydd ab Iago (Kimrio/Belgio)

2004 Helmar Frank (Germanio)

2005 Povilas Jegorovas (Litovio)

2006 Bertilo Wennergren (Svedio)

2007 Peter Zilvar (Germanio)

2008 Ilona Koutny (Pollando)

2009 Aleksander Korĵenkov (Ruslando)

En ĉi tiu jaro kandidatigantoj proponis 21 kandidatojn, al kiuj la elektantoj jene donis la voĉojn:

Katalin Kováts 10 voĉoj

Heidi Goes, Perla Martinelli 3 voĉoj

Stefan MacGill 2 voĉoj

Peter Baláž, Gerrit Berveling, István Ertl,

Zsófia Kóródy, Stefan Maul, Humphrey Tonkin . . . 1 voĉo

Katalin Kováts, hungarino loĝanta en Nederlando, estas proklamita la Esperantisto de la Jaro 2010 pro la diversmaniera antaŭenigo de profesieca instruado de Esperanto, interalie, pro la popularigo kaj okazigo de la [ekzamenoj](#) laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro kaj pro la renovigo de la porinstruista retejo [<edukado.net>](#).

En la februara kajero de *La Ondo de Esperanto* aperos intervjuo kun la Esperantisto de la Jaro 2010 kaj la listoj de la kandidatigantoj kaj elektantoj.

Ni sendas korajn gratulojn al Katalin!

Halina Gorecka, sekretario

Kvankam oni multe parolas pri la ĝenerala varmiĝo de la klimato, la du lastaj vintroj en Eŭropo estas nekutime fruaj, malvarmaj kaj neĝoplenaj. Tion montras kovropaĝa foto de Aleksej Korĵenkov, kiun li faris en la Altaj Tatroj.

Ni deziras gajan Kristnaskon kaj bonan novan jaron 2011 al ĉiuj legantoj!

Esperanto-urbo Herzberg – plia sukcesa jaro

Centoj da homoj el multaj landoj vizitis nin dum 2010. La preskaŭ plena dua granda gastlibro atestas pri famaj gastoj, interesaj eventoj, gajaj horoj, amikaj rilatoj, kontentaj vizitantoj. Ĉi-sube ni resumas por *La Ondo* la plej gravajn okazintaĵojn en laŭtema strukturo.

Instruado, projektoj

En aprilo finiĝis la dujara Cemenius-projekto kun gelnantoj el la bazaj lernejoj de Miskolc (Hungario), Bar Hill (Britio) kaj Herzberg (Germanio). Por la sukcesa EU-projekto oni uzis Esperanton kiel la komunan pontlingvon por neŭtrala aliro al la kulturoj de la eŭropaj najbaroj. Okazis granda adiaŭa festo en la bazlernejo en Herzberg kune kun la gepatroj, instruistoj, infanoj, politikistoj, projekthelpantoj kaj gastoj. Danke al Esperanto la infanoj amikiĝis kaj lernis ŝati aliajn lingvojn kaj kulturojn.

La daŭrigo de la sukcesa Grundtvig-projekto kun la partneroj en Pollando kaj Slovakio estis unu el la prioritatoj. Temas pri klerigado de homoj, kiuj superas la aĝon de 50 jaroj. Oni esploras la lernfaciligan efikon per Esperanto. Pluraj partoprenantoj, kiuj komencis sian intensan lingvan-metodikan trejnadon dum Torpedo-5 en Herzberg en oktobro 2009 sukcese trapasis UEA/KER ekzamenojn dum somera seminario en Slovakio en 2010.

Grava tasko estas fakultativa instruado en la urbaj bazlernejo kaj gimnazio. Estas muziko por la oreloj se gepatroj foje demandas: “Ĉu mia infano rajtas lerni Esperanton?”

Ankaŭ eksterlerneja instruado estas en la repertuaro de la Interkultura Centro Herzberg (ICH): regulaj lingvokursoj en ĉiuj niveloj (A1-C1), preparado al ekzamenoj, seminarioj, trejnado kaj pluklerigado de Esperanto-instruantoj estas troveblaj en nia jarkalendaro.

Staĝantoj, helpantoj

Dum 2010 kelkaj staĝantoj ricevis la ŝancon movade spertiĝi kaj lingve perfektigi sub la gvido de Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar en la Esperanto-Centro. Danke al la bone ellaborita Grundtvig-projekto kaj invito de ICH, t. n. Grundtvig-asistanto povis staĝi en la Esperanto-urbo. Małgorzata Komarnicka bone utiligis tiun preskaŭ unujaran periodon por fari sekretariajn laborojn por ILEI.

Daŭras la tradicie bonaj interrilatoj de ICH kaj la korea Esperanto-movado.

En la lastaj jaroj tio ebligis viziton de pluraj spertiĝemaj koreaj junuloj. Ili estas ĉiam amike akceptataj.

Novaj staĝantoj, junaj kaj maljunaj entuziasmaj kunlaborantoj estas atendataj por helpi la varian agadon de ICH en la nova jaro. Ni alvokas al komuna konstruado de la Esperanto-urbo!

Eventoj

Renkontiĝoj abundis en la Esperanto-urbo, inter ili ni mencias nur du aparte memorindajn. En julio 2010 okazis la internacia OSIEK-konferenco kun tre interesa programo, fakprelegoj de famaj esperantistoj, ekzemple, d-ro Detlev Blanke, d-ro Ulrich Lins, prof. Michel Duc Goninaz, Tom Witkam kaj aliaj. Elstaran kantvesperon prezentis Jacques LePuil. Armela LeQuint ekspoziciis siajn plenfantaziajn pentraĵojn en la urba biblioteko.

Jam la kvinan fojon ICH organizis — kun financa subteno de la urboj Herzberg kaj Góra (Pollando) — renkontiĝon de ĝemelurbaj gejunuloj. La sukcesa kunferiumado ĉi-jare okazis en Herzberg-Sieber. Estis ĝojige sperti la bonan interparoladon, amikiĝon de samaĝuloj. Estas nepre daŭriginda kaj daŭrigota agado, eĉ kun verŝajna partopreno de alilandaj gejunuloj.

Kulturo, turismo

La regiono kaj la urbo ofertas multajn vidindaĵojn, interesaĵojn, kiuj paŝo post paŝo ricevas ankaŭ sian Esperantan karakteron. La urbestro Gerhard Walter donacis tri grandajn Esperanto-flagojn, kiujn nun la urbo hisas antaŭ la urbo-domo, ekzemple, dum ŝtataj festotagoj.



Elstara sukceso estas la atingo de konstanta “Esperanto-ĉambro” en la loka kastelmuzeo. Tie nun ni povas montri la valorojn de Esperanto, varbi por servoj kaj informi pri la internacia lingvo. Jam okazis tie ekspozicioj pri Zamenhof kaj pri porinfanaj libroj en Esperanto.

La biblioteko kaj arkivo en la domo de ICH kreskis dum 2010. Pli ol 8000 libroj, ĉ. 20.000 gazetoj, 1000 turismaj broŝuroj, 300 filmoj, 500 diversaj sonunuoj k.a. estas en la elektronike registrita katalogo kaj estas atingeblaj por vizitantoj surloke kaj por alilokaj uzantoj laŭ interkonsento. Ni volas, ke tiu materialo estu alirebla, kaj ni fieras pri tio, ke nia Esperanto-domo estas preskaŭ ĉiam atingebla telefone kaj rete, kaj ĝi provizas studemulojn per kompetenta faka helpo.

Fondaĵo, financoj

La disvastigon de Esperanto kaj subtenon de la Esperanto-agadoj en kaj por la Esperanto-urbo celas helpi la nova “Fondaĵo Esperanto-urbo Herzberg”. Laŭ la intenco ĝi fariĝos solida bazo por konservi la jam atingitajn Esperanto-rezultojn en la urbo kaj por helpi la kreadon de unika “Esperanto-modelurbo”.

La persista plujara laborado montras jam kelkajn videblajn fruktojn. Sur multaj vojoj ni progresas kaj alvokas al internacia subteno, kunirado, kunkreado.

Nova jaro, novaj defioj

Ĉiam pli da homoj en la urbo kaj en la internacia Esperanto-movado klare ekvidas, kiajn ŝancojn la lingvo kaj la lingvouzantoj ricevas ĉi tie, kaj tiu modelo, tiuj spertoj bone subtenas kaj fortigas ankaŭ en aliaj urboj kaj landoj la aktivulojn por nia lingvo.

Grandaj defioj atendas nin en 2011. Ni deziras al ĉiuj legantoj de *La Ondo de Esperanto* sukcesan, rezultoplenan, bonan novan jaron!

ICH

La ĉefo de la distrikto Osterode am Harz Bernhard Reuter inaŭguris novan kamionon por kvarlingva varbado (angle, germane, pole kaj Esperante) kontraŭ rasismo. La kamiono traveturos Eŭropon. Pro la neŭtraleco kaj vera internacieco oni elektis Esperanton kiel plej okulfrapan lingvon.

Sur la foto: la projektgvidanto Thiemann kun reprezentantoj de ICH Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar.



Mauro Nervi (Fotis F. L. Veuthey)

Malferma Tago en Roterdamo

La Esperanto-poeto Mauro Nervi estis la ĉefgasto de la 33-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA sabaton, la 27-an de novembro, kiu allogis 90 vizitantojn el 16 landoj. Nervi kontribuis al la programo per du prelegoj. En la unua li parolis pri la idea esenco de la Akademio Literatura de Esperanto, kies prezidanto li estas. En la dua Nervi parolis pri la poezio kaj verkista agado de la Esperanta kandidato por la literatura Nobel-premio Baldur Ragnarsson.

Katalin Kováts prezentis la renovigitan retejon edukado.net kaj priskribis kiel utiligi ĝin por lerni kaj instrui Esperanton. Pri sia vojaĝo al Indonezio por instrui Esperanton kaj studi la historion de la tiea movado parolis Heidi Goes. Trifoje estis montrita la filmo *Conlang*. Antaŭ ĝia unua prezento Chuck Smith parolis pri ĝi kaj pri la subtena agado por ebligi ĝian DVD-eldonon. En la biblioteko, kiu por la tago estis transformita en kinejon, oni montris ankaŭ plurajn aliajn filmojn. Dum la lasta horo de la programo la tri ĉeestantaj estraranoj de UEA Claude Nourmont, Barbara Pietrzak kaj Loes Demmendaal respondis demandojn kaj diskutis kun la publiko.

La plej furora titolo en la libroservo estis la ĵus aperinta nederlanda versio de la broŝuro *Malkovru Esperanton*, de kiu vendiĝis 34 ekzempleroj. Preskaŭ same populara estis la ekzerclibro *Poŝamiko* (31 ekz.). La nova, reviziita eldono de *Baza Esperanta radikaro* kaj la rememoroj *Post la pluvo — pluvego* de Eddy Raats estis venditaj en po 7 ekzempleroj. La ĉi-lastaj estas daŭrigo de *La longa vojaĝo*, kiu trovis 5 klientojn, same kiel *Mil unuaj vortoj en Esperanto*. Lokon super ili en la taga furorlisto konkeris la biografia skizo *Zamenhof* de Aleksander Korĵenkov. La suma valoro de la libroservaj vendoj estis 2189 eŭroj. Krom la ĝenerala rabato de 10% multaj libroj estis ekstre rabatitaj.

GK UEA

IJK 2012 okazos en Japanio

TEJO ĝojas anonci, ke la 68a Internacia Junulara Kongreso okazos en Naha, la ĉefurbo de la Okinava insulo en Japanio. Organizos ĝin la Japana Esperanto-Junularo (J EJ).

La Okinavaj Insuloj troviĝas en la sudokcidenta Japanio, havas mirindan naturon, belegajn historiajn konstruaĵojn kaj speciale bongustan kuirarton. Okinavo proksimas al Tajvano, Ĉinio kaj Vjetnamio, do estas tre facile vojaĝi ankaŭ al la Vjetnama UK en Hanojo.

IJK por la dua fojo gastos en Japanio. La unua junulara kongreso tie okazis en la 1965-a jaro en la urbo Ootu.

TEJO

Digna rekono en Malbork

La 25an de novembro en la konferenca salono de la hotelo *Majewski* en Malbork (Pollando) okazis solenaĵo por honori personojn kaj organizaĵojn pro la agado en la loka socia vivo. La konkurso estas parto de la projekto “Tempo por NRO” (neregistaraj organizaĵoj), financata de la urba oficejo de Malbork.

En la kvar kategorioj konkursis 23 kandidatoj. La ĵurio elektis kvar laŭreatojn kaj rekonis ok distingitojn en la kategorioj *Personeco de NRO*, *Plej bona projekto*, *Mecenato*, *Volontulo*. Eduardo Kozyra, prezidanto de la Malborka Esperanto-klubo *Kastelo*, estis distingita en la kategorio *Personeco* kaj la klubo *Kastelo* mem en la kategorio *Plej bona projekto*. La Esperanto-klubo estis la sola NRO ricevinta pli ol unu premion.

Pri la distingitoj kaj pri la ceremonio informis multaj gazetoj kaj retejoj, inkluzive de la oficiala retejo de la urbo.

HaGo



Ĉinio: studentoj amase lernas

Baotou

(ĈHC) En la lernojaro 2010–2011 Esperanto estas unuafoje enmetita en la regulan studprogramon de la Supera Mezlernejo de Tian Jiabing de la urbo Baotou, Aŭtonoma Regiono de la Interna Mongolio, Ĉinio. La unuajaruloj havas unu Esperanto-lecionon ĉiusemajne kaj la duajaruloj havas du ĉiusemajne.

Entute pli ol 700 studentoj studas Esperanton. 110 studentoj sin anoncis por studi nian lingvon ekster la regulaj lecionoj en la lernojaro 2008–2009 kaj iuj korespondas kun usonaj esperantistoj. La Esperanto-instruado estas aranĝita kunlabore kun la Baotou-a Esperanto-Asocio. La lernejo tre favoras al la Esperanto-instruado, kaj liveras al la Asocio oficejon kun kompletaj mebloj kaj ekipaĵoj por la Esperanto-instruado kaj du klasĉambrojn por lecionoj de Esperanto.

En la jaro 2005 ankaŭ la Scienc-Teknika Universitato de la Interna Mongolio en Baotou enkondukis Esperanton kiel elekteblan studobjekton, kaj ĝi daŭras en la nova semestro de la kuranta jaro. La kurso konsistas el 32 klashoroj kun du studopontoj. 257 studentoj, kiuj elektas Esperanton kiel nedevigan lecionon, estas dividitaj en du grupoj. Krome pli ol 20 studentoj interesiĝis pri Esperanto kaj komencis lerni ĝin ekster la devigaj lecionoj en septembro, kaj la malnova kurso havas 15 lernantojn.

La instruado estas ĉefe farata de Liu Baoguo kontata laŭ la Esperanto-nomo Optimisto.

Liu Zijia

Harbino

En Harbino (Ĉinio) komenciĝis instruado de Esperanto ĉe la Harbina YuTong Esperanta Disvolviĝa Instituto. Ekfunkciis du grupoj kun du lecionoj ĉiusemajne: 16 kursanoj en A-grupo kaj 23 kursanoj en B-grupo. La kursanoj venis el la Heilongjiang-a Scienc-Teknika Instituto.

Song Ping

Zaozhuang

23 nov 2010 komenciĝis en la Zaozhuang-a Profesia Instituto Esperanto-kurso por studentoj, funkciigita de la Esperanto-Societo de Studentoj de la instituto. La kurson gvidas Zhao Yaping, vicĝenerala sekretario de la Zaozhuang-a Esperanto-Asocio kaj instruisto de la Zaozhuang-a Profesia Instituto.

ĈHC

La faka vivo en Esperanto evoluu

KAEST (Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko) estas hodiaŭ unu el la plej gravaj agadoj stimulantaj la sciencan kaj fakan uzon de Esperanto.

Origine temis pri komuna aranĝo de la sciencoteknikaj sekcioj de la ĉeĥa kaj slovaka landaj asocioj de UEA, kiu okazis sepfoje inter 1978 kaj 1989, kaj reviviĝis en 1998 kiel ĉiujdujara evento aranĝata de KAVA-PECH, ĝis kiam en la jaro 2010 transprenis ĝin la junulara organizo E@I. Ankaŭ pri tiu historio de la du gravaj serioj de sciencoteknikaj aranĝoj en la Meza Eŭropo oni povis aŭdi forme de prelego dum KAEST 2010, kiu okazis de la 18a ĝis la 21a de novembro en Modra-Harmónia, nur 30 km de la slovaka ĉefurbo Bratislavo.

Partoprenis 52 homoj el 15 landoj kaj la ĉi-jara ĉeftemo estis “Modernaj teknologioj por Esperanto”, kun aparta atento al komputila lingvistiko. La ĉefan programon de la konferenco (de la vendreda vespero ĝis la dimanĉa tagmezo) ja konsistigis prelegoj (entute 34 en du paralelaj blokoj, ekde memregaj aŭtomobiloj ĝis kuracaj plantoj), sed danke al plilongigo de la aranĝo (kiu komenciĝis jaŭde) ne mankis ĉi-foje loko ankaŭ por aktivaĵoj praktikaj (Vikipedia trejnado), popularsciencaj (prezento de kelkaj esperantigitaj filmetoj el www.ted.com), kulturaj (komuna kantado), kulinaraj (vingustumado) aŭ turismaj (duontagaj ekskursoj). Ĉion ĉi ankoraŭ sekvis dimanĉe kaj lunde en pli intima etoso Esperanta komputil-lingvista kolokvo, per si mem unika laborkunveno de pintaj aktivuloj tiukampaj, subvenciita de IEI. Okazis ankaŭ rara diskuto pri terminologia laboro.

Transdono de KAEST al E@I montriĝis bona decido, ankaŭ ĉar pro la apuro de junuloj (triono de la ĉeestintoj) la averaĝa partoprenanto revenis en malmeritan aĝon (45). Tio eĉ donas esperon por la planita revigliĝo de ISAE. Siajn reprezentantojn sendis UEA, ILEI kaj la Pola Radio. En la retejo <http://www.ikso.net/kaest/> jam nun elŝuteblas la uzitaj prezentaĵoj, sekvas videoregistraĵoj de elektitaj prelegoj kaj printempe ankaŭ prelegkolekto — aĉetebla papere kaj elektronike.

Marek Blahuš

**Ne forgesu
(re)aboni**



Marek Blahuš prelegas en KAEST (Fotis Peter Baláž)

Multaj ŝanĝoj en PEJ

Multajn ŝanĝojn enkondukis kunveno de Pola Esperanto-Junularo, okazinta en Bjalistoko la lastan novembran semajnfino.

Unu el la ĉefaj decidoj estas ŝanĝo de la prezidantino. Post rezigno de la ĝisnuna prezidantino, Agnieszka Rzezińska, por tiu posteno oni elektis Agnieszka Mozer el Varsovio.

Certe plej multan tempon en la kunveno oni dediĉis al diskuto pri ŝanĝo de la PEJ-regularo. La ĉefa celo de la nova projekto estis pliefikigo de la organizo kaj forigo de problemoj, kiujn kreis la antaŭa regularo el la 2004a jaro. Post enkonduko de korekto proponoj, nova regularo estis akceptita unuanime kaj ekvalidos post aprobo fare de la Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Asocio.

Oni diskutis aferojn ligitajn kun kunfandado kaj aliĝo al la Pola Konsilio de Junularaj Organizoj. Kadre de subtenado de loka agado oni kreis laborgrupojn pri konkretaj projektoj. Unu el ili okupiĝos pri preparado de pakaĵo kun instrumaterialoj por homoj dezirantaj instrui Esperanton. La dua analizos eblecon utiligi programon de Eŭropa Volontula Servo kaj trovi volontulon, kiu laborus por PEJ. La tria preparos inform-materialojn pri nia organizo.

Dum paŭzo, malgraŭ malfacilaj veterkondiĉoj, partoprenantoj de la kunveno partoprenis urban ludon *Laŭ la spuroj de Esperanto*.

La lasta tagordero en la programo de la kunveno estis ŝanĝo de la emblemo de PEJ. Sume prezentitaj estis ses proponoj. Elektita estis la projekto *pej preparita de Przemek Wierzbowski.

PEJ

ĈEJ: La plej sukcesa renkontiĝo

En la urbeto Žirovnice 12–14 novokazis la 7a renkontiĝo de Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ). Partoprenis 20 esperantistoj, inkluzive de 3 gastoj el Aŭstrio kaj Slovakio, kio igis la renkontiĝon la plej sukcesa en la kvinjara historio de la organizo kun escepto de la IJK organizita en Ĉeĥio en 2009.

La paroĥejan ripozdomon *Esperanto* disponigis Max Kašparů, konata psiĥiatro kaj diakono kiu pasintjare eklernis Esperanton kaj jam eldonis Esperanto-tradukon de unu el siaj verkoj.

Sabate matene okazis gvidata promeno tra Žirovnice, kies retpaĝaro enhavas ankaŭ Esperantan informilon. La urbo estas konata pro butonfabrikado (el perlamoto), kaj situas en ĝi gotika kastelo, novgotika preĝejo de sanktaj Filipo kaj Jakobo (kie dimanĉe okazis meso kun esperantlingva prediko de Max Kašparů).

Posttagmeze la renkontiĝon vizitis ĵurnalistoj de distrikta gazeto, kiuj lunde aperigis du artikolojn kun grandaj fotoj. Sekvis kunveno de la ĝenerala asembleo kiu resumis agadon de la pasinta jaro kaj elektis la novan estraron kun Daniel Mrázek kiel prezidanto kaj Marek Blahuš kiel vicprezidanto.

Miroslav Hruška





Esperanto-stando en Querétaro

Herzberg: Nova fondaĵo

La konstruado de la Esperanto-urbo kostis, kosta kaj kosta monon. Multaj projektoj atendas realigadon. Tiucele la 3an de decembro 2010 en la urbodomo de Herzberg estis starigita “Fondaĵo Esperanto-urbo Herzberg”.

La ĉefo de la estraro estas la urbestro Gerhard Walter mem. Pliaj estraranoj estas Harald Mantz (Osterode), Brian Moon (Luksemburgio), Otto Kern kaj Dirk Brömme (ambaŭ el Herzberg). Membroj de la unua kuratoraro estas Marika Frense, Zsófia Kóródy, Ursula Zilvar, d-ro Detlev Blanke, Gian Carlo Fighiera, d-ro Rudolf Fischer, Stefan MacGill, d-ro Wilfried Hinrichs, Michael Nienstedt, Harald Schicke, Gerhard Steiling, Peter Zilvar. La baza kapitalo estas 30.000 eŭroj. Tamen oni povos uzi nur la interezon por subteni Esperanton.

ICH

Esperanto-instruejo en Sicilio

Itala Esperanto-Federacio kaj la komunumo Mazara-del-Vallo (Sicilio) interkonsentas pri malfermo de Centro por Interkulturo kaj Esperanto en la ĉeplaĝa sicilia urbo.



Por ĝin aktivigi ni serĉas:

- instruistojn (por instrui kaj al junuloj kaj ĉefe al plenkreskuloj),
- administran respondeculon.

La dungado estos surbaze de Eŭropa projekto, kun daŭro de 13 ĝis 45 semajnoj. La salajro estos 4.263 eŭroj por la unua 13-semajna periodo kaj 192 eŭroj po ĉiu plia semajno. Ni preferus longdaŭrajn proponojn por bone enradikigi la Centron en tiu regiono.

Kandidatiĝproponoj devos esti pretaj antaŭ la fino de februaro. Kaze de akcepto de Eŭropaj instancoj, laborkomenco okazos ekde aŭgusto 2011. Depende de la estontaj cirkonstancoj, ni esperas ke estos eĉ ebleco por pli longa kunlaboro.

Francesco Maurelli

Ekspozicio “Esperanto-mondo”

Esperanto-societo en Turku (Finnlando) havis Esperanto-ekspozicion en la biblioteko de la kvartalo Runosmäki.

Triparta verda rako belis kaj plenis sub la nomo “Esperanto-mondo”. Per tekstofolioj kun bildoj prezentiĝis nia internacia lingvejo en “nuksoŝelo”. Specialaj bildoj estis pri Zamenhof kiel la 28-jara aŭtoro de la unua Esperanto-lernolibro, grupfoto pri kongresanoj en 1905, kaj el kolora kolektaĵo de UK-afiŝoj el la Helsinka UK (1922). Por valoraj nealarmprotektitaj libroj kaj diskosoj ni rajtis prunti du-bretan vitrinon. La apuda tablo pleniĝis per gazetoj, libroj kaj kunpreneblaj prospektoj.

La biblioteko akceptis nin korege kaj informis pri la ekspozicio en sia propra retpaĝo.

Anna-Liisa Ali-Simola

(Fotis Jukka Nikolskelainen)

Plia lingvo-kongreso en Meksiko

Meksika Esperanto-Federacio (MEF) denove partoprenis en lingvo-kongreso. 24–26 nov 2010 en la urbo Querétaro, ĉ. 200 kilometrojn for de la ĉefurbo, okazis la akademie altkvalita 24a Forumo de Universitataj Specialistoj pri Fremdaj Lingvoj kun la temo “Novaj tendencoj, novaj kunteksto, novaj retoj de kunlaboro, novaj retoj”. Ĉeestis ĉ. 300 fakuloj, inter tiuj profesoroj de lingvaj fakultatoj de diversaj meksikaj universitatoj.

La evento estis organizita de la Lingva Fakultato de la Universitato Aŭtonoma de Querétaro, kie ekde marto 2010 oni instruas Esperanton en liberaj kursoj. La instruistoj estas Sergio Romero kaj liaj gelnantoj, Carlos Hernández kaj Zyanya O’ Neil.

MEF aranĝis standon kaj dufoje kontribuis al la programo. Ĵaŭde Sergio Romero kaj Martin Schaeffer dum unu-hora laborgrupo antaŭ 16 ĉeestantoj eksterplane prezentis erojn de la gramatiko kaj de la vortfarada sistemo de Esperanto.

La planitan kaj oficialan prelegon pri Esperanto partoprenis 46 personoj. La prezidantino de MEF, Mallely Martínez Mateos, kaj Martin Schaeffer parolis pri la temo “Esperanto: komunikado kaj interkultureco”. Oni atente sekvis la prelegon kaj pluraj homoj poste vizitis nian informstandon. En tiu ĉi kazo bone estis ke en la programo la prelego pri Esperanto aperis kune kun mallongaj informoj pri la lingvo kaj pri la celoj de Meksika Esperanto-Federacio.

MEF donacis al la aŭkcio lernolibron kun espero, ke la bonŝanca ricevinto lernu la Internacian Lingvon. Je la fino la direktorino de la Lingva Fakultato, Eugenia Castillejos, dankis la kunlaboron de universitatoj kaj asocioj, inter ili ŝi menciis MEF.

Vendrede vespere, post la fermo de la kongreso, Mallely kaj Martin ĉeestis kunvenon de la Esperanto-klubo de Querétaro. El la eŭropa vidpunkto temas pri junulara grupo, ĉar preskaŭ neniu ano aĝas pli ol 30. Sed ĉeestis ankaŭ Fidel Figueroa, la dojeno de la Esperantomovado en Meksiko; li lernis Esperanton en 1954.

Ni revenos al Querétaro, ĉar la direktorino de la lingva fakultato invitis la prezidantaron de MEF kaj min al renkontiĝo fine de decembro por priparoli la oficialan enkondukon de Esperanto en la lingva fakultato. Ĉu la movado en Meksiko ricevos Kristnaskan donacon?

Martin Schaeffer

GRUPE: La 14an fojon en Gliwice

Post la pasintjara festado de la cent-jariĝo de la Esperanto-movado en Gliwice, ĉi-jare, 11–14 nov por partopreni la 14an GRUPE (Gliwice-a Rendevuo de Uzantoj kaj Praktikantoj de Esperanto) al Gliwice venis esperantistoj el diversaj anguloj de Pollando. El Kievo venis Miĥail Lineckij kun du kantistinoj. Entute la aranĝon partoprenis ĉirkaŭ kvindek personoj. Nome de la Urba Oficejo la partoprenantojn salutis vic-prezidantino Renata Caban.

La partoprenantoj povis aŭskulti interesajn prelegojn kaj rakontojn. Pri kelkajara travivaĵo en Ĉinio rakontis profesia ĉinologo Jarosław Zawadzki. Pri la situacio en la pollanda Esperanto-movado parolis la prezidantino de PEA Halina Komar. La polan sekcion de IKUE kaj la IKUE-Kongreson en Parizo prezentis Zofia Śmistek. La Havanan UKon prezentis interese kaj vigle Halina Radoła. Pri regionaj, sileziaj, secesiaj vitraloj rakontis Ewa Caban.

Neforgeseblajn momentojn travivis ĉiuj partoprenantoj de subtera ekskurso al karbominejo Guido en la proksima urbo Zabrze. Krome grupe-anoj konatiĝis kun la moderniganta centro de la urbo kaj muzeo en iama kasteleto de la dinastio Pjast.

En la vendreda posttagmezo brile kaj profesie estis prezentita monodramo pri Ludoviko Zamenhof. Tiun taskon kun granda alplaŭdo de la spektantoj plenumis Helena Biskup.

Vesperaj horoj dum GRUPE-14 estis dediĉitaj al amuzaj momentoj. La juna kantistino Sylwia Lipka el la proksima urbo Knurów profesie prezentis siajn kantojn. Unu el ili ŝi prezentis la unuan fojon ankaŭ en Esperanto.

Interese kaj amuze prezentis sin la grupo el Kievo kaj anoj de la Universitato de la Tria Aĝo el Gliwice. Dum organizita loterio krom Esperanto-librojn oni povis ricevi kelkajn interesajn premiojn.

Forvojaĝantoj konstatis, ke GRUPE-14 sukcesis kaj estis interesa. Same kiel dum la pasintaj multaj jaroj ĝi okazis en Gliwice-a Centro de Neregistaraj Organizaĵoj, kie estas bonaj kondiĉoj por funkciado kaj organizado de similaj kunvenoj.

Ĉiuj partoprenintoj jam antaŭĝojas reveni al Gliwice venontjare, por partopreni la esperantistan rendevuon kaj kunfesti malgrandan jubileon dum GRUPE-15.

Stanislaw Mandrak



Sylwia Lipka kantas en Gliwice

TILE-6: Tagoj ĉe la Nigra Maro

29 okt – 4 nov 2010 la nigramara urbo Soĉi (Ruslando) la sesan fojon gastigis la Tagojn de Internacia lingvo Esperanto (TILE-6).

La plej granda kaj plej aktiva grupo da patroprenantoj venis el la urbo Uljanovsk. Ili prezentis bild-filmon pri sia urbo ĉe la rivero Volgo, spektaklon *Rapeto* laŭ fama rusa fabelo, fotoekspozicion pri Ruslandaj urboj, koncerton de Esperanto-kantoj kaj aktive partoprenis en seminario pri kluba agado.

Aleksej Borodin okazigis per skajpo interparoladon kun japana Esperanto-klaso, Galina Belenjuk rakontis pri la Kuba UK. Oni diskutis eblecon organizi venontsomere RET-on sur la bordo de la Nigra maro apud Gelnĝik, kaj kelkaj partoprenantoj tuj aliĝis al la aranĝo.

Okazis ekskurso per ĵipoj al Krasnaja Poljana, kie en 2014 okazos la Vintraj Olimpikoj. Vizititaj estis ankaŭ la Serpentaj akvofaloj kaj multaj aliaj vidindaĵoj. Ĉe la Arbo de Amikeco, Anatolij Masenko fotiĝis apud la grefto, kiun li faris antaŭ 44 jaroj en la unua renkontiĝo de Kaŭkazaj esperantistoj en Soĉi.

Vladimir Bepalov



Eventoj

Vjetnamio: En du universitatoj

En novembro la Trejna subkomitato de la Vjetnama Esperanto-Asocio malfermis kurson de Esperanto por 20 studentoj el la Hanoja Malferma Universitato kaj por 25 studentoj de la Hanoja Fremdlingva Universitato.

Danke al la aktiva propagando pri Esperanto kaj pri la 97a UK (Hanojo, 2012) fare de Pham Mai Lan kaj Nguyen Thi Thom Thom — instruistinoj de tiuj universitatoj kaj samtempe membroj de Centra Komitato de VEA — la studentoj scias, ke ili povos fariĝi volontuloj-helpantoj en UK-97.

Mai Lan, kiu posedas sian propran centron de trejnado de la angla, konsentis, ke la 20-leciona kurso por studentoj de la Malferma Universitato okazu senpage en ŝia centro.

Laŭ Thom Thom, la nuna nombro de studentoj en Fremdlingva Universitato dezirantaj lerni Esperanton estas granda. Oni devos malfermi pliajn kursojn.

Krom la malnovaj instruistoj, ĉi-jare instruas du junaj instruistinoj: Nguyen Thi Nep kaj Le Minh Thu — du el la dek studentoj, kiuj ricevis la plej altajn poentojn en la ekzameno por volontuloj-helpantoj de IJK-63 en 2007.

Laŭ *Verda Mesaĝo el Vjetnamio*

Evidente: Esperanto en praktiko

En novembro al Kaliningrado — la ĉefurbo de la plej okcidenta Ruslanda regiono — el Nederlando venis specialistoj de internacia bonfara fonduso *Evidente* kaj la fondinto de la fonduso, esperantisto Jacques Tuinder.

La vizito okazis laŭ invito de loka neregistara organizaĵo, kies celo estas defendo de rajtoj de handikapitoj, kaj helpe de kelkaj aliaj samcelaj organizaĵoj kaj volontuloj. Dum kvin tagoj okulistoj kaj optikisto senpage akceptis vidhandikapitojn kaj neriĉajn homojn kun vidproblemoj. Kelkcent vizitantoj estis esplorataj, multaj tuj ricevis okulvitrojn, al la aliaj ili estos sendataj poŝte.

Ĝi estis la dua vizito de *Evidente* en Kaliningradon, kaj la tria en Ruslandon. La fonduso agas pli ol 40 jarojn en malriĉaj landoj kaj kunlabore kun lokaj esperantistoj. Specialistoj el *Evidente* ne nur esploras kaj operacias homojn en la tuta mondo, sed ankaŭ helpas al porblindulaj lernejoj kaj malsanulejoj. Tiu nobla agado estas samtempe perfekta ekzemplo de praktika apliko de Esperanto kaj klara rivelado de ties interna ideo.

Nikolaj Penĉukov

Unufraze

★ Re prezentanto de la Esperanta PEN-Centro, Giorgio Silfer, 4 dec partoprenis en mezorienta packonferenco organizita de la magistrato de Hajfo. (HeKo)

★ La alternativa, multlingva novaĵretejo Tlaxcala en novembro ekuzis ankaŭ Eon, paralele kun dek du pliaj lingvoj; ĝin prizorgas Jorge Camacho. (*Libera Folio*)

★ La entrepreno *BT Global Services*, kiu estas parto de la brita telefonkompanio BT (ĉ. 35 mil dungitoj) en sia nova duminuta varbofilmeto BTGS uzis Eton inter la naŭ lingvoj. (Lu Wunsch-Rols-hoven)

★ *Esperanto ¿Una cura para las heridas de Babel?* de R. Sartor k A. Battig estas la unua libro eldonita kadre de “Biblioteko de la Argentina Lernejo de Esperanto”, kiu celas doni al la Argentina E-movado taŭgajn manlibrojn por instrui k disvastigi Eon, i.a. por la anoncita E-katedro en la Universitato de La Plata. (*SEK-Bulteno*)

★ 27 nov la franca E-kantisto JoMo prezentis sian programon en la restoracio *Kolorowa* en la pollanda urbo Olsztyn, kie li koncertis sur la malnovurba ĉefplaco en la E-renkontiĝo FREŜO en 2009 k 2010. (Marian Zdankowski)

★ 10 dec en la Nacia Biblioteko de Udmurtio, Ijevsk, estis premiitaj laŭreatoj de la fotofilma (Slide Show) konkurso “Francio por ĉiam”, la trian premion ricevis la konata e-isto Bronislav Ĉupin pro la serio “Mia amata Francio”. (B. Ĉ)

★ Ekde 2011 la redaktoro de la revuo *Esperanto* de UEA, Stano Marček, redaktos la revuon de Germana E-Asocio *Esperanto Aktuell*; la novan taskon li akceptis sen interkonsiliĝo kun la estraro de UEA. (*Libera Folio*)

★ Volodimir Hordijenko estas elektita kiel prezidanto de la Ukraina E-Asocio en duŝtupa balotado okazinta en la landa kongreso. (Eŭheno Kovtonjuk)

★ Post la propravola demisio de Miĥail Ĉertilov, Natalja Ŝoroĥova ekoficis kiel la kasisto de REU; pli frue, en la landa kongreso en Peterburgo, Ĉertilov ne estis reelektita kiel prezidanto de REU k ĉefdelegito de UEA por Ruslando. (REU-agado)

★ Nur 359 personoj el 45 landoj aliĝis al la 96a UK en Kopenhago; plej multe el Danlando 52, Germanio 41, Francio 36, Nederlando 33, Japanio 19. (uea.org)

★ La Saksa E-Biblioteko en Dresdno nun ampleksas 4304 librojn. (*Verda Saksofono*)

Pollando: Tutsemajna kongreso

La 32a Tutpollanda Esperanto-Kongreso okazos 30 apr – 7 maj 2011 en belega montara regiono Sandecia Beskido, en la centra urbo de la regiono — Nowy Sącz, 100 km sud-oriente de Krakovo kaj najbare ĉe Slovakio.

La kongreso estas dediĉita al la 105a jubileo de la unua Esperanto-klubo en Nowy Sącz, 105a datreveno de *Pola Esperantisto*, kaj 55-jariĝo de la reaktiviĝo de la Esperanto-movado en Nowy Sącz. La kongresa temo estas “Civitana aktiveco de esperantistoj”.

En la programo de la Kongreso:

— Rolo de esperantistaro en nuna realeco de Pollando kaj Eŭropo. La celo estas trovi la ĝustan lokon por nia movado kaj elpensi manierojn por enplekti ĝin en aliajn similajn, ĝenerale uzablajn agadojn kaj projektojn sociajn, kulturajn, edukajn — en Pollando kaj en aliaj landoj.

— Instruado de Esperanto: larĝa diskuto kaj bilanco de la bezonoj, rolo de ILEI kaj PEJ/TEJO, laboro por UTA-oj, sukcesigo de la informado pri lernebl-ecoj, organizado de Esperanto-kursoj. Modelaj lecionoj. Seminario por prepariĝo al KER. Ekzameno.

— Diskutoj pri *Pola Esperantisto* pro la rezigno de la nuna redakcia teamo: proponoj de redaktantoj, de teknika prilaboranto, abonkotizoj kaj presejo. Interparolado pri la formo kaj enhavo de la revuo, proponoj pri ĝia eventuala ŝanĝo.

4. Varia arta kaj amuza oferto: ĉiutage oni okazigos spektaklon aŭ distran aranĝon: folkloraj ensembloj, klasika muziko, teatraĵo, romantika balo, kantado ĉe fajro, kvin ekskursoj.

5. Dum la lasta tago de la Kongreso okazos Ĝenerala Kunsido de Delegitoj de PEA, dum kiu oni elektos la novan Estraron de la Asocio.

Informojn pri la aliĝado, loĝado, manĝado kaj aliaj temoj petu poŝte (Nowy Sącz, PL 33-300, Aleja Wolności 37 F 7) aŭ rete (korlando@o2.pl).

Barlastono atendas vin en 2011

14–16 jan. **Ni festivalu!** — eblo por ajnaj grupaj renkontiĝoj, kiu inkluzivas precipe la staĝon pri la Esperanta teatro **Ni teatrumu!** Samtempe: **Drono**. Semajnfina Esperant-lingva diskutrondo (por progresintoj) pri diversaj temoj.

15–19 aŭg. La 51a **Somera Festivalo**. Kunludu kaj kunstudu en Barlastono. Du-nivela kursaro kun la eblo turismi aŭ private studi / esplori en la Biblioteko Butler.

21–23 okt. **Course-You-Can**. Kurso ĉefe por anglalingvaj komencantoj / komencintoj. Samtempe: **Drono**.

✉ Esperanto-Domo, Station Road, Barlaston, Staffordshire, DT12 9DE, Britio

☎ +44-(0)1782-372141

✉ eab@esperanto-gb.org

Esperantaj sabatoj

“Sabatoj Esperanto” estas unutagaj staĝetoj de la klubo *Esperanto Vannes* (Francio). Ili okazas ses-foje jare dum tri jaroj en vasta ĉambro de la kvartalo Cliscouët, sabato de la 10a ĝis la 17a.

Dum la *Sabatoj* la partoprenantoj gramatikumas laŭ antaŭdifinita temo, ludas aŭ eĉ gimnastikas en humora etoso. Kvankam la partoprenantaro estas dividita en du laŭnivelaĵoj dum la kursetoj, ili kunas dum la plejparto de la kunveno inkluzive de la tagmanĝo. Ĉi-jare, ĉiu aranĝo ligitas kun koloro kaj tio permesas starigi novajn ludojn kaj instrui alimaniere erojn de nia kulturo (proverbojn, dirmanierojn ktp).

Ĉi-jare jam okazis du *Sabatoj*. Do restas kvar: la 15an de januaro, 19an de februaro, 19an de marto kaj la 16an de aprilo. Se tio allogas vin, la klubanoj de Vannes plezure bonvenigos vin!

✉ Esperanto Vannes, 20 place Fareham, FR-56000, Francio

✉ esperanto.vannes@hotmail.fr

<http://www.esperantovannes.fr>

Elisabeth Le Dru, Matĵo



Nowy Sącz: La estonta kongresejo

Eŭropo falas pro WikiLeaks

Dafydd ab Iago el Bruselo

La granda skandalo ĉirkaŭ la retejo wikileaks.org, aŭ wikileaks.ch tuŝas preskaŭ ĉiujn landojn de la mondo. Tiuj landoj, kiuj ankoraŭ ne estas menciitaj en la diplomataj “kabloj” aŭ depeŝoj, certe ricevos mencion, se estos publikigitaj ĉiuj dokumentoj. Ankaŭ Eŭropo multe figuras en la dokumentoj, jen je la landa, jen je la Eŭropunia nivelo.

Unu el la plej grandaj demandoj por Eŭropo estas: ĉu la Eŭropaj leĝoj kaj rajtoj estas respektataj. Eĉ la plej aĉa krimulo havas rajtojn (kaj devojn). Ĉu ankaŭ en la kazo de Julian Assange, la ĉefo kaj fondinto de WikiLeaks? Klare, ne.

La Eŭropa Unio kun granda pompo deklaras sin la hejmo de la homaj rajtoj, kie la politikaj kaj sociaj rajtoj estas respektataj. La kazo de Assange klare montras la gravan kondiĉon de la Eŭropunia rajto-protektado: ĝi povas esti kaj estas nuligita, se granda potenco tiel decidas.

Unu el la plej bazaj homaj rajtoj estas la rajto je vivo. “Ni devas trakti sinjoron Assange same kiel iun ajn altan teroristan celon”, — diris Jeffrey T Kuhner en la renoma *Washington Times*. William Kristol, ekskabinetestro de la iama vicprezidanto Dan Quayle, demandis: “Kial ni ne povas uzi niajn diversajn ilojn por ataki, forpreni aŭ neŭtraliĝi Assange kaj liajn kunlaborantojn, kie ajn ili estas?” Pli sincera estis la fama publicisto Jonah Goldberg: “Kial Julian Assange ankoraŭ ne estas morta?” Laŭ la usona konservativulo John Hawkins, la Centra Inform-Agentejo (CIA) jam



Julian Assange (Wikimedia Commons)

devintus mortigi Assange. Eĉ Sarah Palin, estonta kandidato por la Usona prezidenteco, komparas Assange kun la ĉefo de Al Qaeda. Ĝis nun Eŭropo ne reagis al tiuj deklaroj, kvankam minaco de mortigo estas punenda krimo.

Grava estas ankaŭ la silento pri evidenta premo fare de la Usona registaro kaj Usonaj politikistoj al diversaj entreprenoj. *Amazon*, ekzemple, nuligis la kontrakton kun wikileaks.org pri “gastigo” de la retejo. Pro tio la retejo estas neatingebla aŭ malfacile atingebla. Ankaŭ Eric Besson, la franca ministro respondeca pri industrio, provis malpermesi francajn ret-entreprenojn gastigi wikileaks.org. “Francio ne povas gastigi retejojn, kiuj atencas la konfidon de diplomataj rilatoj kaj endanĝerigas homojn protektatajn per diplomata sekreteco”, — skribis Besson al la instanco

reganta la interreton en Francio. Tamen ankaŭ en tio la Eŭropa Unio restis silenta. Feliĉe, konscienca juĝisto nuligis la peton de Besson, kaj miloj da homoj kreis retejojn-spegulojn de wikileaks.org.

Pli grava estas la tranĉo de financaj rilatoj kun WikiLeaks. La unua ekzemplo estas la interreta pago-servo PayPal: “PayPal por ĉiam restriktis la konton de WikiLeaks pro malobservo de la *akceptebla uzpolitiko* de PayPal. Tiu deklaras, ke nia pago-servo ne povas esti uzata por aktivaĵoj kiuj instigas, antaŭenigas, faciligas aŭ instrukcias aliajn al kontraŭleĝa agado”. PayPal, kvankam Usona entreprenado, devas respekti Eŭropajn leĝojn en Eŭropo, kaj ĝis kiam WikiLeaks kaj Assange restas nekondamnitaj, ili ne estas kulpaj en Eŭropo.

La plej farsa ago rilatas al la preteksto por aresti Assange en Londono surbaze de Eŭropa arest-mandato farita de sveda justico pro unue konsentita seksumado kun du virinoj ĉi-somere. Ĉu Assange transiris la limon de la konsentita seksumado, aŭ ĉu li estas viktimo de Usona premo al la jura sistemo en Svedio? Ĉiuokaze, Assange nun estas malantaŭ baroj por respondi al demandoj pri tio, ĉu li seksperfortis laŭ la difino, nekutime larĝa por Svedio.

Eva Diesen, advokato kaj esploristo ĉe la Stokholma Universitato, rimarkigas, ke la kondamno-indico estas malalta, parte pro manko de materialaj indikoj en la kazo de Assange. Ekde aŭgusto, kiam la plendoj estis registritaj, tri prokuroroj malakceptis malfermi enketon. Tiaj neklaraj laŭleĝaj moroj estas normo por enketado de sekskrimoj en Svedio, laŭ Diesen.

Pri la forgesita teksto de Zamenhof

La forgesita teksto (*LOdE-194*, p. 16) estas mallonga, sed ege interesa por mi kiu modeste provas ĉitempe kompari la “neŭtraliĝon” de homaranismo kun la “foriĝo” (le retrait) de la imitemdezira teorio de René Girard. En tiu teksto, la kuracisto antaŭ la malsanulo neŭtraliĝas ĉiujn arbitrajn trajtojn kiel la religion, la morojn, ktp., kaj koncentriĝas sur la “pure homaj” bezonoj. Tiele, la kuracisto iĝas ideala modelo de la homarano.

Siaflanke, la imitemdezira teorio (de la 1990aj bazita sur la malkovro de la spegulaj neŭronoj) tre klare distingas “homajn bezonojn” kaj “kulturan arbitrecon” (sub diversaj avataroj), kiun Girard interpretas kiel sisteman — sed placeban — perforton kiu evitas pli gravan perforton de “ĉiuj kontraŭ ĉiuj” kaŭzitan de ĝeneraligita homamasa blinda interimitado (imitemdezira krizo). Oni ne povas eltiri la deziron ekster la homo, sed la homo povas ĝin redirekti al modeloj kiuj kulture... emas foriĝi. Laŭ Girard, paco — se eblas — akiriĝas je tiu prezo: kultura foriĝo.

Girard traktas malrekte la temon en la kvina ĉapitro de

“Achever Clausewitz” pri la radikala foriĝo de Hölderlin. En sia libro *Psychopolitique* la ĵirarda psikiatro Jean-Michel Oughourlian proponas pliajn modelojn: Gandhi, Martin Luther King kaj Mandela. Mi aldonus Thoreau, kaj mi ne certas ke oni iam ne devos aldoni ankaŭ... Zamenhofon.

Se la komparo ne estas tute maltaŭga, kaj se Korĵenkov estas fidinda (ni ne dubu), oni nun povas kompreni pli ĝuste kial Zamenhof ĉiam vidis Esperanton kiel akcesoran fronte al sia ĉefa intereso — la paco interpopola — kaj kial li finfine emis turniĝi eksteresperantujen por trovi pli atentemajn orelojn:

«La lastan version de la homaranismo Zamenhof intencis disvastigi ne en Esperantujo (li sensukcese faris tion en 1913), sed en la tuta mondo, kaj ne per Esperanto, sed per la plej grandaj naciaj lingvoj. Ĉu li poste malgravigus la interesojn de la esperantistoj, kiuj klare preferis la kongresecan Esperantujon, sed ne la strebadon al la spirita unuiĝo de la homaro? Ni ne scias... la kvara versio restas la lasta». (Korĵenkov A. *Homarano*. Kaliningrado: Sezonoj, 2009, p. 270–271.)

Michel Légaré (Kebekio)

Pli da oferto por la estonto



Mi legis la artikolon de Renato, kaj mi ne povas ne konsenti. Kiel prezidanto de HEF, mi povas diri ke la problemoj pri la malkresko de la membraro ne malsimilas en UEA kaj en la lokaj asocioj.

Miaopinie, estas du punktoj, kiuj povus difini la situacion:

1) La mondo ŝanĝiĝas, kaj tio signifas unue, ke la bezonoj por la ekzisto de esperantaj asocioj ĝenerale, ne el la vidpunkto de la “movado”, sed de la uzantoj mem, preskaŭ malaperis. Nun ne necesas, almenaŭ en Eŭropo, havi klubon aŭ asocion por aĉeti libron, por komuniki kun lokaj kaj eksterlandaj esperantistoj, por esti informita pri Esperanto-aranĝoj... Ĉion oni povas havi rete. Do, la ideo devas esti radikale ŝanĝi la filozofion de la asocioj kaj repensi la verajn servojn, kiujn ili povas provizi al la uzantoj kaj aliĝuntoj. Alidirite, se oni volas vendi varon, oni ne devas reklami kial tiu varo estas bona por la vendanto, sed kial ĝi bonus por la aĉetunto.

2) La asocioj devas radikale modernigi. En la plejmulto de la asocioj, inkluzive de UEA, ŝvebas ia odoro de kadukeco, de nostalgio, portreto de Zamenhof inkluzive, kaj strebo organizi kongresojn kiel antaŭ cent jaroj. Tio povas esti agrabla etoso por homoj kiuj partoprenis UK dum la lastaj 50 jaroj, sed ni ne pensu, ke tio povus esti alloga por novaj esperantistoj, ĉefe junuloj, freŝbakitaj en Interretaj kursoj.

Mi donos ekzemplon. Mia unua UK estis Florenco, kaj du aferoj, kiujn mi partoprenis, mi neniam plu partoprenus. Temas pri la bankedo kaj pri la oficialaj ekskursoj. Kial? Ĉu la manĝo ne bonis, ĉu mi ne amuziĝis, ĉu la ekskursoj ne estis kvalitatitaj??? Jes, sed eble tro, kaj tro elitaj. Mi povas imagi, ke en la tempo de Zamenhof la partoprenantoj de la UK estis pli similaj inter si laŭ la financaj kapabloj, aĝo (se estis junuloj verŝajne estis kiel aldono al la gepatroj), kaj ĉiuj kune partoprenis ĉiujn aranĝojn.

En la nunaj kongresoj, la partoprenantoj estas ege diversaj, riĉaj kaj malriĉaj, estas homoj el la tuta mondo, multaj kiuj partoprenas helpataj de malavaro de aliaj pli riĉaj esperantistoj, homoj kiuj iras al kvinstela hotelo, kaj homoj kiuj iras al amasloĝejo. Tamen la bankedo estas multekosta, la ekskursoj

estas multekostaj, kaj la plejmulto de la homoj ne povas elspezi tiun monon. Finfine, miasperte en tiuj aranĝoj en Florenco partoprenis nur maljunaj homoj el okcidentaj landoj kaj Japanujo, kaj tute ridinda procento de la partoprenantoj en la UK.

Mi supozas ke multaj jam pensas pri pravigoj (financaj bezonoj, tradicio, ktp.), sed diable, kiel vi volas, ke homoj tiom engaĝiĝu al movado, kiu diskriminacias ilin pro ilia malriĉeco, por aliĝi al UEA??? Miaopinie, en la UK pli bone ne estu oficiala bankedo, eble estus pli bone, laŭnecese, organizi *privatan* por la gravuloj, sed ne kiel programeron, aŭ organizi ian komunan manĝon, partopreneblan de ĉiuj. La kulturaj aranĝoj, kaj unue la ekskursoj, devus esti alireblaj almenaŭ al la plej granda parto de la partoprenantoj. Kaj alia tradicio estas la okazigo de diservo. Karaj, nia movado estas ege diversa, eĉ religie (aŭ malreligie). Diservo devus esti programero kadre de IKUE, sed ne kiel parto de la ĝenerala programo de la UK. Aŭ ĉu por tio UEA ne devas esti neŭtrala???

Do, la recepto estas simpla: malpli da tradicio, malpli da *La Espero*, malpli da nostalgio, kaj multe pli da kompreno de la nuna socio kaj ties funkciado, kaj pli da oferto por la estonto, kaj la estonto ne estas jam tiuj, kiuj kunvenas en loka klubo, sed tiuj, kiuj lernas la lingvon rete, havas neniun kontakton kun nevirtualaj esperantistoj, kaj bezonas instigon kaj kialigon por ekpartopreni la realan movadon.

Mi ne plu havas kongresetan aĝon, mi estas 45-jara, sed la estraro de nia asocio estas tre juna (mi estas fakte la “oldul-aĉo”, kiel dirus iu nia samideano), kaj ni konscias pri la urĝa bezono adaptiĝi al la nuna junularo, interalie per la sociaj retoj. La alia, tradicia, nostalgia mondo, sendepende ĉu ni ŝatas aŭ ne, simple forpasas.

Pedro Hernández

Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio

Ni ne devas senti malesperon

Renato Corsetti pravas multflanke en la artikolo *Subeniro kaj falo de UEA*. Por la jaro 2010 la ciferoj eĉ estas pli drastaj. Laŭ prognozoj UEA en 2010 jam havos malpli ol 16 mil membrojn. El tiuj ĉirkaŭ 5.300 individuaj membroj kaj 10.500 asociaj membroj. Vere katastrofa situacio por UEA.

En la hodiaŭa tempo multaj “servoj” de UEA estas trov-eblaj en la reto. Oni ne plu devas esti membro de asocio por praktiki Esperanton. Samtempe UEA malmulton faras sur la kampoj “instruado de Esperanto” kaj “informado pri Esperanto” (UEA-membroj jes faras, sed UEA apenaŭ finance subtenas). La personoj, kiuj do volas subteni Esperanton pro idealismo ankaŭ perdas la intereson pri membriĝo en UEA. En la libro *La Rondo Familia* de Nikola Rašić aperas rezulto pri enketo farita inter la membroj de UEA. La idealismaj motivoj por multaj membroj de UEA en la tempo de la enketo estis tre gravaj por membriĝo. Ĉe la demando “Kio estas plej subteninda en la agado de UEA?” la plej altan valoron ricevis “informado pri Esperanto, lingvaj problemoj”.

UEA laŭ mia opinio devus dediĉi pli da financaj rimedoj al tiu kampo kaj redukti la kostojn en la administra sektoro. Ĉe ŝanĝo de UEA, ni do nepre atentu pri tiu punkto.

Nek Renato Corsetti, nek mi, nek la Esperanto-movado tamen devas senti malesperon. Pro la reto, la movado nun ĉie en la mondo kreskas. Neniam la movado estis tiom sendependa de UEA kiel nun. La situacio do estas multe pli pozitiva ol oni pensas, se oni nur vidas la membronombrojn de UEA.

Martin Schaeffer

INTERNACIA ESPERANTO-INSTITUTO

Riouwstraat 172, 2585 HW Den Haag, Nederlando

iesperanto@versatel.nl

www.iei.nl

vendas proprajn eldonaĵojn, interalie:

Vortoj de Andreo Cseh € 15,-

Vivo de Andreo Cseh € 18,-

Konversacia vortaro € 13,-

verkoj de Edmond Privat

kaj aliajn novajn kaj brokantajn librojn.

La Esperanto-movado ne estas reformebla

La redakcian komenton en *La Ondo de Esperanto*, 2010, №10, mi ŝatus komenti jene:

Punkto 1: Kritikante la malnovan Esperanto-movadon, *Spegulo* prezentis ideojn pri alternativaj modeloj, eble iom nekutimajn kaj radikalajn, sed tamen konsiderindajn. Ni venis al la konkludo, ke la Esperanto-movado evidente ne estas matura por kritiko kaj akcepto de novaj ideoj kaj modeloj, kaj surbaze de la validaj premisoj verŝajne en si mem ĝi ankaŭ ne estas reformebla. Ni konstatis kaj daŭre konstatas, ke eĉ novaj ideoj kaj projektoj, se ili ne estas tute sendependaj, al kroĉiĝas al la malnova movado, ripetante la samajn erarojn. Cetere, la redakcio de *Spegulo* ĉiam reprezentis proprajn kaj sendependajn vidpunktojn, komentis, laŭdis aŭ kritikis kaj elektis la temojn laŭ sia propra bontrovo kaj ne lasis sin influi de ekstere. En tio tiu revuo estis unika, sed restis nur eksperimento.

Punkto 2: Preskaŭ ĉiuj tekstoj estis originale verkitaj studoj kaj ne reaperigoj. La redakcio investis sufiĉe multe da tempo, honorofice, por elverki tiujn artikolojn. Multaj tekstoj estis ankaŭ tradukoj el nacilingvoj.

Punkto 3: Mi dubas, ĉu la aserto de AIKo, ke “inter ni ne multas admirantoj de la usoneca vivostilo kaj de la kapitalisma ekonomio” kaj “ke nia lingvokomunumo estas <...> simpatianta kun la ŝtatoj (eks)socialismaj kaj triamondaj”, estas prava, aŭ ĝusta. Eĉ se multaj kiel cetere ankaŭ la redakcianoj de *Spegulo* kritike rilatas al Usono kaj al la kapitalismo, verŝajne la plimulto de klarvidaj esperantistoj ne vidas alian pli realisman politikan-socian modelon ol la okcidentan, liberalisman kaj kapitalisman ordon, kiun post la kolapso de la sovetia komunismo adoptis eĉ (eks)socialismaj kaj triamondaj landoj, malgraŭ ĉiuj ĝiaj malavantaĝoj. Ĉu Castro estas sincera amiko de Esperanto, oni povas pridubi. Kiel soldato kun terorisma kaj diktatora pasinteco li (kaj lia frato-ŝtatestro) probable ne kompatas aŭ protektus kubajn esperantistojn kaj ne hezitus persekuti kaj ĵeti ilin en la malliberejon, se ili aŭdacus opozicii kontraŭ la Castro-reĝimo en disidenta senco. Tion la kubaj esperantistoj perfekte scias. Same en Irano, Vjetnamio, Ĉinio, Mongolio, Ruslando, landoj ŝajne tiom ŝatataj kaj embarase flatataj de certaj esperantistoj, kiuj evidente pretervidas la drastajn civilizajn kaj homrajtajn problemojn en tiuj landoj.

Punkto 4: *Spegulo* ideo, koncepte kaj enhave draste distingigis de la modelo de la menciitaj periodaĵoj. *Spegulo* orientigis laŭ normoj de la nacilingva publicistiko (kaj ne laŭ certaj normoj validaj en la Esperanto-movado). Pro tio ekzistis nenia konkurenco al tiuj periodaĵoj. Per siaj modestaj resursoj *Spegulo* atingis laŭ mi pli ol averaĝe dignan formaton, kaj sub tiaj kondiĉoj teni 80–100 abonantojn ne estis malbona rezulto. Por periferia (aŭ niĉa) revuo kiel *Spegulo* estis malfacile enpenetri la sekiĝintan kaj ŝajne satan Esperanto-merkaton por daŭre establiĝi en la Esperanto-movado, en kiu mankas novaj publikoj kaj klientaroj. Krom tio oni ne forgesu, sur kiuj cindroj aŭ ruinoj *Spegulo* naskiĝis kaj kiom forta kontraŭstaro kontraŭ ĝi ekzistis flanke de certaj medioj. Do, ne la kaŭzoj menciitaj de AIKo kondukis al la ĉesigo de *Spegulo*, decidita de la eldonisto ĉefe pro ekonomiaj kialoj, sed la kaŭzoj alparolitaj en ĉi tiu plej lasta alineo.

Andreas Künzli

(aprobata de Tomasz Chmielik)

Ne forgesu (re)aboni



Foto de LinguaForce

Sojasun jogurtoj en Esperanto

La profesia ekspoziciego SIAL okazis apud Parizo inter 17a kaj la 21a de oktobro 2010. Inter ties pli ol kvinmil budoj, unu el la grandaj estis tiu de *Triballat*. Sur tiu ĉi, kune kun diversaj produktoj kaj novaĵoj, videblis pakaĵo de la jogurtoj *Sojasun* tute en Esperanto! Ĝi estis prototipo tie prezentata estante kandidato por novigpremio. Esperantigis ĝin la kompanio *LinguaForce* en Rennes.

En la septembra numero de la profesia revuo CFIA, Olivier Clanchin, estro de *Triballat*, klarigas pri Esperanto:

«Konsideri la morgaŭon signifas ankaŭ konstrui eŭropan kulturon. Kiam oni parolas pri “eŭropa kulturo” ankaŭ temas pri “komunikado”... “Ni ekopiniis ke Esperanto povus esti modelo”. Kiam, aŭdinte tion, oni ironias pri Esperanto, la estro ekridetas: “Nu, ankaŭ ĉi-kaze, same kiel por *Bio* kaj sojo, ekzistas homoj kiuj deziras kredi en ĝi. Ni kredis en la aliaj projektoj... do Esperanto, kial ne? Tio indas, do oni provu. Estas pozitive preti sukcesigi defiojn!” La entrepreno estas bona vektoro por testi tiun koncepton. Ekde kiam estas io kolektiva kun homoj kiuj ne uzas saman lingvon, Esperanto povas esti kohera ilo, kiu regatas dekfoje pli rapide ol la angla. “Ni ne forgesu ke ni estas Eŭropo 27-opa. Se ni ĉiuj havus komunan lingvon, tio plirapidigus multajn demarŝojn. Krome, en la logiko de daŭripovo, tie kie oni parolas pri malpligrandigo de pakaĵoj, kiel fari per tiom da lingvoj kiom da landoj kiam oni volas eksporti unusolan produkton? Kiam vi aĉetas hejmajn aparatojn, kiom da kilogramoj da papero estas, da manlibroj, en ĉiuj lingvoj? Esperanto estas la sola justa lingvo... ĉar neniu naskiĝas kun ĝi...»

Laŭ <http://www.linguaforce.com>

Tago de la kuracaj plantoj

Renkontiĝon okaze de la Tago de la kuracaj plantoj organizos 24–26 jun 2011 Esperanto-Societo *Sukceso* (Vraca, Bulgario), en la monaĥejo Sankta Profeto Ilija inter la urboj Mezdra kaj Roman. Laŭ la bulgara popolkalendaro, la 24a de junio estas la Tago de la kuracaj plantoj.

La programo de la renkontiĝo antaŭvidas prelegojn pri la kuracplantoj kaj la popol-kredoj kaj -kutimoj tiuokaze, pri la utiligo de kuracplantoj por memsanigo kaj por produktado de medikamentoj, pri la historio de la monaĥejo (aĝa kelkajn jarcentojn, situanta en pitoreska loko, kelkcent metrojn apud la internacia fervojo Bukareŝto-Sofio), folklor-muzikan kaj literaturan programon. Por la Sankta Meso la organizantoj invitos la Episkopon de Vraca, en kies diocezo estas la monaĥejo.

✉ Esperanto, PK 26, BG-3000 Vraca, Bulgario
✉ sukceso@bitex.bg

Vojaĝo en 2067

de Wolfgang Kirschstein

En 2009 pro la insidoj de financaj fi-guruoj mi perdis mian laboron. Mi estas nun en tia situacio: tro maljuna por esti dungita denove, sed tro juna por ricevi pension. Tial tre bona nepala amiko kaj mi decidis fariĝi komercistoj. Mi estas Wolfgang, li Tanka, tiel naskiĝis Wotanimport. La vojaĝo havis tri celojn — vidi la landon, kontakti kun produktantoj kaj, precipe por Tanka, ĝui la hinduan Tihar-festivalon.

Antaŭ la vojaĝo mia patrino demandis min: kiamaniere imagi Nepalon. Mi devis respondi, ke mi ne sciis, do estis nenio alia por fari ol malfermi la okulojn, vidi kaj observi, kiel kamerao. En la flughaveno afiŝo bonvenigas nin al “mistera Nepalo”, kvazaŭ estus rekta vojo al Ŝangri-la. Ni vojaĝis ne por fuĝi el la realeco, tial ne taŭgas deklaro pri “spirita vojaĝo”. La paradizo probable ne estas ĉi tie, sed kio estas?

LA URBO VEKIĜAS

Mi kuŝas en la lito kaj aŭskultas la sonojn de la urbo. Fore estas iu mania koko; ne nur matene, sed ankaŭ vespere ĝi frenezas kaj klopodas anonci la aŭroriĝon. Ĝi almenaŭ sukcesas atentigi pri sia ekzisto. La kokerikadon akompanas jelpo de strataj hundoj. Strataj hundoj abundas en Kathmandu; dum la tago ili evitas la atenton de la homoj, sed nokte estas ilia tempo. Kiam ne estas trafiko, ili reĝas en la stratoj. Ili jam konas la trafikon, por mi estas ankoraŭ konfuze, sed la trafiko obeas alternativajn regulojn, kiujn mi devos lerni. La plej grava reguligilo de la trafiko estas la hupo, manke de aliaj signaloj. Kiam estas la horo de la koko kaj de la hundoj, la veturiloj kapablas veturi sene, sed kiam estas pli ol unu aŭto, hupado estas persista kaj intensa. Jam iras homoj surstrate. Populara estas tiu gargara sputo, kiun la ĉinaj komunistoj klopodis ekstermi — ankaŭ tie sen aŭdebla rezulto. Jam la suno leviĝas malantaŭ la montaro. Dum tagoj sunaj estas grandioza vido al la fora montaro. El iuj fenestroj aŭskulteblas la matena adora himno *Om jai jagadiŝ hare*: “Ho, dio de l’ tuta universo, ho, pova dio de l’ tuta universo, la agonioj de la konsekritoj, la malesperoj de la konsekritoj estas forigitaj de Vi, ho reganto de l’ tuta universo”. Ni estas pretaj por komenci la tagon.

RELIGIO

Ni alvenis dum la lastaj tagoj de la 15-taga festivalo Daŝajn kaj spertis ankaŭ Tihar-on, la duan festivalon laŭ la graveco, kvintagan. Dum Daŝajn la pli aĝaj benas la junulojn Wolfgang (la dua de maldekstre) kun siaj novaj “gefratoj”



per aplikado de *tika*. Ankaŭ mi estis konsiderita kiel junulo (ĉar ja estas homoj pli aĝaj ol mi) kaj ricevis tiun ornamon. *Tika* konsistas el ruĝa farbo, rizo kaj jahurto. La ruĝa koloro ankaŭ estas simbolo por la sango, kiu unuigas la familion, tial mi kvazaŭ fariĝis membro de la familio. Dum Tihar estas simila ceremonio por gefratoj, kaj la fratinoj akceptis min kvazaŭ kiel fraton. Bedaŭrinde por la hinduoj la homaro ne estas unu granda rondo familia. Volonte mi estus vizitinta la famajn templojn de la monda heredaĵo, sed ve! ne eblas: ĉe la eniro de la temploj estas la ofenda barilo: “Nur por hinduoj”. Same kiel la blankuloj de Sudafriko, la hinduaj dioj ŝajnas timi la renkontiĝon kun aliuloj (ĉu vere tiuj dioj estas tiom malfortaj, ke rigardo de nekredantoj povas ĝeni ilin?) Mi diskutis tion kun iu dano loĝanta en Nepalo, kiu argumentis, ke ni devas *respekti* tiun sintenon. La nevidebla pliigas la misteron de la lando, li diris. Tiel argumentas multkulturistoj, sed mi ne intencas respekti sintenon, kiu deklaras min nepura. Eĉ eŭropano havas foje memestimon.

Por Budho ne gravas, kiu vizitas kaj rigardas lin. Ĉio estas libere alirebla en la temploj de la budhistoj. Budho naskiĝis en regiono, kiu apartenas al Nepalo, sed nun la kredo de budhistoj estas en precipe hindua ĉirkaŭaĵo. Tiu frazo tamen ne estas komplete vera, ĉar estas pluraj lokoj, kiujn kaj hinduistoj kaj budhistoj adoras. Budho estas ankaŭ parto de hinduismo, kaj la religioj iel influis unu la alian, sen komplete fariĝi sinkretistaj.

Religio estas videbla ne nur ĉirkaŭ la temploj. Interese estas, ke por la sanktaj almozpetantaj viroj, la sadhuoj, nur mi, sed ne *mia mono*, estis malpura. Nur unufoje iu petis *bakŝiŝ* ĉe budhista templo, sed tiu ne montris malplenan siteleton, sed donis almenaŭ iun benon anstataŭe. Religio ankaŭ influas la vivon de homoj, kaj ne ĉiam en pozitiva direkto, ekzemple kiam gurooj trovas datojn por okazigi eventojn. Okazas, ke knabino devas interrompi sian studadon, se guroo opinias, ke la plej bonŝanca dato por edziniĝo estas antaŭ la kompletigo de la edukado — kaj tradiciemaj homoj sekvas tiun konsilon. Tio montras, ke Nepalo daŭre estas survoje al la vojo de moderna socio.

EDUKADO

Ĉie en la urbo estas afiŝoj pri lernejoj; ŝajnas, ke estas granda malsato por lerni ion. Scio estas povo; konoj montras la vojon el malriĉeco. Afiŝoj alvokas studi en Japanio kaj Koreio. Eŭropo mankas en tiu bukedo, kiu denove konfirmas mian impreson, ke politikistoj en mia kontinento profunde ronkas, dum la mondo ŝanĝiĝas. Ni ne fariĝas socio de konoj per malgrandigo de lokoj por lerni; tio estas la plej taŭga maniero por forŝpari la estontecon de mia kontinento. Azio lertiĝas, dum Eŭropo stultiĝas.

Alia, same grava, vojo al evoluo estas stabila politika sistemo. Sed en Nepalo la ordo ne ĉiam estas funkcianta. Se plaĉas al la maŭistoj en Nepalo, ili lamigas la tutan landon per ĝenerala striko (tion ili faris pli frue en 2010). Se la lando ankaŭ estonte dependos de la kapricoj de la komunistoj, la vojo al evoluo estos barita.

Espereble, tio ne okazos, kaj mi spertis, ke mi enamiĝis en la landon. Mi fartis bone en Nepalo, mi ŝatis ĉion, vivis kun la neperfektaj flankoj de la vivo. Nenio estas senespera, ĉio estas riparebla kaj plibonigebla, kiel la truoj sur la vojoj.

Ni esperas, ke nia eta komerco fariĝos sukceso, kaj mi antaŭĝojas profundigi miajn impresojn en 2068. En Nepalo la tradicia kalendaro estas pli vaste uzata ol la okcidenta; kaj la sekva jaro estos la 2068a. Kaj kial finfine mi ŝategas Nepalon? La “mistiko” de la lando tamen kaptis min.

Hachette

En la pionira periodo de Esperanto, Zamenhof kaj liaj samtempuloj mem eldonis siajn verkojn ĉe diversaj pres-ejoj, ekzemple, ĉe Kelter en Varsovio kaj ĉe Tümmel en Nurenbergo. La eldonado ne estis kunordigita, ofte aperis libroj hazardaj aŭ/kaj lingve fuŝaj. La unuan grandskalan provon de sistema eldonado de libroj en/pri Esperanto entreprenis la Pariza eldonejo *Hachette et Cie*.

Ĉi tiu eldonejo, fondita en 1826 de Louis Christophe Hachette (1800–1864), ekinteresiĝis pri Esperanto danke al la esperantisto kaj matematikisto Carlo Bourlet, kies lernolibrojn *Hachette* eldonadis. Bourlet aranĝis en julio 1901 kontrakton inter Zamenhof kaj *Hachette*. Laŭ ĝi *Hachette* komencis eldonadon de “Kolekto Esperanta aprobita de D^o Zamenhof”, kaj Zamenhof ricevis procentaĵon de ĉiu eldonaĵo el la “Kolekto”. Li ankaŭ devontigis sin publikigi siajn librojn nur ĉe *Hachette*.

Louis de Beaufront reprezentis Zamenhofon ĉe *Hachette*. Per tio Beaufront ricevis la kontrolon pri la Esperanta literaturo (kaj procentaĵon de ĉiu vendata libro), kio ne plaĉis al Bourlet kaj aliaj Parizaj Esperanto-gvidantoj. En januaro 1903 la kontrakto estis rearanĝita avantaĝe al Zamenhof. En junio 1903 Beaufront perdis la fidon de *Hachette*, kiu ekuzis la servojn de Bourlet.

Ĝis la unua mondmilito la rolo de *Hachette* en la Esperanta libroeldonado estis grandega. Kvankam Zamenhof asertis, ke ĉiu povas libere eldoni Esperanto-verkojn, estis klare, ke la plej valoraj (kaj plej debitaj!) libroj aperas ĉe *Hachette*, kaj tio reduktis la ŝancon de aliaj eldonejoj. Sed la ekskluziva pozicio de *Hachette* estis ankaŭ pozitiva. Ĝi havis filiojn en multaj landoj, kaj ĉiu deziranto povis facile aĉeti ĝiajn librojn en/pri Esperanto tra tiu reto, ankaŭ danke al la jar-almanako de *Hachette* kun regula paĝo pri Esperanto.

La serĉilo *Trovanto* de la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno registras 372 librojn de *Hachette*. La rezulto ne estas absolute fidinda: mankas kelkaj reeldonoj; almenaŭ du libroj ne rilatas rekte al Esperanto; aliflanke registriĝis kelkaj duoblaĵoj kaj libroj eldonitaj de aliaj. Sed manke de alia bibliografio, ni

Ĉi-jare en la kleriga rubriko *Nia trezoro* ni prezentos dek plej gravajn Esperanto-eldonejojn.



uzu la Vienan liston por koncize prezenti la eldonaĵojn de *Hachette*.

En la unua eldonjaro 1901 aperis nur du lerniloj de Beaufront, sed poste la eldonado intensiĝis: 1902 — 14 libroj, 1903 — 21, 1904 — 29, 1905 — 37, 1906 — 43. En 1907 *Hachette* rekordis kun 57 libroj pri/en Esperanto eldonitaj dum unu jaro! Post la Ido-krizo la eldonado kontinue ŝrumpis: 1908 — 45, 1909 — 29, 1910 — 29, 1911 — 21, 1912 — 17, 1913 — 9, 1914 — 7 (kelkaj libroj malhavas indikon pri la eldonjaro).

Eĉ nun, kiam la libroproduktado iĝis ege pli facila kaj malpli kosta ol antaŭ cent jaroj, neniu el la Esperanto-eldonejoj aktivas simile al *Hachette*, kiu dum 14 jaroj (1901–1914) surmerkatis ĉ. 350 librojn — averaĝe 25 librojn jare. La nuna statistiko, bazita sur la rubriko *Laste aperis* en la revuo *Esperanto*, montras, ke dum la lastaj 19 jaroj (1991–2009) la plej aktiva Esperanto-eldonejo estas UEA kun 138 eldonitaj libroj — averaĝe 7,3 libroj jare, malpli ol triono de la jara produktado de *Hachette*.

La plej eldonataj aŭtoroj ĉe *Hachette* estis Zamenhof (66 libroj, inkluzive de 21 eldonoj de la *Fundamento* en Esperanto kaj en aliaj lingvoj), Beaufront (32) kaj Théophile Cart (28).

Hachette primare zorgis pri lerniloj por francoj. Multaj havis plurajn reeldonojn, kiel *Commentaire sur la grammaire Esperanto* de Louis de Beaufront (ĝi unue aperis ĉe alia eldonejo) kaj *L'Esperanto en dix leçons* de Théophile Cart kaj Maurice Pagnier. Grandan (eĉ skandalan) efikon havis la Esperanta-franca vortaro de Émile Grosjean-Maupin.

Aperis ĉe *Hachette* ankaŭ prilingvaj

verkoj internacie valoraj (*Vortaro de Esperanto* de Kabe, *Matematika terminaro* de Raoul Bricard, *Provo de marista terminaro* de Rollet de l'Isle, *Histoire de la langue universelle* de Louis Couturat kaj Léopold Leau k.a.), kaj, plej grave, Zamenhofaj verkoj kun ĉiama graveco: *Fundamenta Krestomatio* kaj *Fundamento de Esperanto*, kaj ankaŭ *Lingvaj Respondoj* kaj *Proverbaro Esperanta*.

Ankaŭ Zamenhofaj tradukoj estis ofte eldonataj. Post reeldono de *Hamleto* ĉe *Hachette* aperis liaj tradukoj de *La revizoro* (Gogol), *Ifigenio en Taŭrido* (Goethe), *La rabistoj* (Schiller), *Georgo Dandin* (Molière) kaj de aliaj mondliteraturaj verkoj, inkluzive de pluraj libroj el la *Malnova Testamento*. Ĉi tiuj tradukoj antaŭ libroforma eldono aperis en *La Revuo*, lanĉita de *Hachette* en septembro 1906 kun la subtitolo “Internacia monata literatura gazeto, kun la konstanta kunlaborado de D-ro L. L. Zamenhof, Aŭtoro de la lingvo Esperanto”.

En la ombro de la Zamenhofaj tradukoj restis verkoj tradukitaj de aliaj. Ni menciuj almenaŭ *Polan antologion*, kompilitan kaj tradukitan de Kabe, kaj ties tradukon de *La faraono* de Prus.

Kvankam inter la unuaj eldonaĵoj de *Hachette* estis *Esperantaj prozaĵoj* kun verkoj ne nur tradukitaj sed ankaŭ originalaj, kiujn Beaufront eltis el sia *L'Espérantiste*, originalaj beletraĵoj estis maloftaj. Tamen inter ili estis *Kastelo de Prelongo* kaj *Ĉu li?* de Henri Vallienne — la plej frue eldonitaj originalaj Esperanto-romanoj (*Sen titolo* de Ŝirjaev ja estis pli frue verkita, sed oni eldonis ĝin multe pli poste).

La fino venis abrupte. La 12an de aŭgusto 1913 Bourlet mortis, kaj *Hachette*, sen lia insistado, perdis intereson pri Esperanto. La esperantistoj restis sen sia plej grava eldonejo, kaj Zamenhof sen sia ĉefa enspezo, pri kio li amare skribis al Cart la 16an de decembro 1913:

«Se mi en la lastaj 9–10 jaroj povis vivi sen zorgoj kaj eĉ permesi al mi ĉiujare 5 aŭ 6-semajnan libertempon, por reboniĝi mian sanon, — tiun povon donis al mi nur la enspezoj, kiujn mi ricevis de *Hachette* pro miaj laboroj. Nun, kiam *Hachette* ne volas plu eldonadi miajn verkojn, mi devas serĉi iun alian rimedon...»

Aleksander Korĵenkov



Anatolij Rybakov: historio de sia lando

de Grigorij Arosev

Januare 2011 centjariĝas Anatolij Rybakov — sovetia verkisto, kiu postvivis areston, falsan akuzon, ekzilon, militon, literaturan rekonon, abundan gratifikon, nepublikigon de sia ĉefverko kaj post jaroj furoron pro tamena publikigo.

Li naskiĝis en 1911 en Ĉernigov (nun en Ukrainio) en juda familio, sed ekde 1919 kune kun la gepatroj ekloĝis en Moskvo, en la fama strato Arbat. Post la lernejoj jaroj li laboris en uzino, komence estis ŝarĝisto, poste — ŝoforo. Estante 22-jara li estis arestita pro “kontraŭ-revolucia agitado kaj propagando” — tre tipa kulpigo por la paranoja politika sistemo de la Sovetuniaj 1930-j jaroj. La kondamno estis 3-jara ekzilo. Post la liberiĝo Rybakov ne rajtis loĝi en pluraj grandaj urboj, do li devis vagabondi kaj labori en plej pezaj “postenoj” kun minimuma apliko de intelekto, sed maksimuma — de fizikaj fortoj.

Dum la Dua Mondmilito Rybakov aktive militservis de la komenco ĝis la fino, partoprenis multajn batalojn. Pro lia elstara servado la ŝtato ne plu konsideris lin juĝita, kvankam plena rehabilito okazis nur en 1960.

Ĉio ĉi aspektas citaĵo el enciklo(aŭ viki-)pedio, sed tio ne estas formalajo — ĉiuj scioj estas senrezerve bezonataj por klare vidi la radikojn kaj devenon de liaj verkoj. Jam tre baldaŭ post la milito (1947) Rybakov publikigis sian unuan porjunularan verkon — novelon *Marklingo* (Kortik), kiun sekvis daŭrigo — *La bronza birdo* (Bronzovaja ptica, 1956). Apenaŭ troviĝus ruslingva adoleskanto, kiu ne legis ĉi tiujn novelojn. Malgraŭ la ideologia atmosfero, ambaŭ noveloj estis tre popularaj — krom bazaj klarigendaj valoroj (familio, amikeco, fideleco ktp), estis tuŝitaj ankaŭ aliaj allogaj por lernejoj temoj — misteraj sekretoj, spionado, heroaĵoj.

Kronologie la romanon *Infanoj de Arbat* (Deti Arbata) Rybakov verkis antaŭ sia alia mejloŝtona laboraĵo, *La peza sablo* (Tjaĵoljy pesok), sed ĉi-lastaj gazetforme aperis pli frue. Fakte *Infanoj de Arbat* estis la unua parto de verko, poste fariĝinta trilogio, sed eĉ la unuan parton oni publikigis nur post 20 jaroj. Kialo de tia trakto de *Infanoj de Arbat* estis eksplacita antistalinismo de la



romano. Stalin estis montrita ne nur monstro, sed, plej grave, timema histeriulo, absolute malaŭdaca kaj senkuraĝa homo. (“Honesteco, sincereco, amo ne estas politikaj kategorioj. Oni havas en politiko nur politikan kalkulon”, — diras Stalin en la teksto.) Rybakov estis inter la unuaj, kiu per publika “skriba vorto” subtenis la supozon, ke Stalin estis ĉiufanke avertata pri tio, ke milito kontraŭ USSR povos komenciĝi fine de junio 1941 (kaj poste oni menciis eĉ precizan tagon), sed li ĉiel neglektis la avertojn, titolante la sovetiajn informantojn “kanajloj kaj malamikoj”. Nun tio estas preskaŭ konfirmita fakto, sed ne tiam.

Centre de la romano estas Aleksandr Pankratov, juna viro, kiu pro mallerte verkita epigrama por murgazeto estis arestita kaj kondamnita por trijara ekzilo. Post ĝia fino li ne povis enveturi Moskvon pro malpermeso, do li devis iri al alia urbo, kie li laboris kiel ŝoforo. La saman laboron li tre brave plenumis dum la milito. Ĉi tiuj, kaj multegaj aliaj koincidoj, ne lasas dubi: Rybakov verkis surbaze de sia propra sperto. Li verkis pri senrajteco de sovetiaj civitanoj, pri teruraĵoj de NKVD, pri absoluta mallibero de homoj — kaj ne gravas, ĉu homo estis “granda” aŭ “malgranda” (t.s. potencohava aŭ ne). Plej simplajn homojn premas pli potencaj, pli potencajn premas eĉ pli potencaj, tiujn — plej potencaj, kaj super ili estas Stalin, kiun premas lia paniko, timo, persekuto-manio kaj ĵaluzo. Neniu estas libera. Kaj

ne vane la dua parto de la romano nomiĝas *La timo*...

La romano (ties unua parto) estis publikigita nur en 1987, en unu el plej aŭtoritataj moskvaj literaturaj gazetoj. Ĝi vekis neeviteblajn diskutojn pri la historio de la lando, pri la tendencoj kaj sekvoj. Krome, dank’ al *Infanoj de Arbat* la procedo de “literatura revenigo” iĝis preskaŭ torenta. Post la *Infanoj* en USSR aperis *Arkipelago GULAG* de Soljenicyn, *Rakontoj de Kolyma* de Ŝalamov, *Doktoro Ĵivago* de Pasternak, *Ni* de Zamjatin kaj multaj aliaj.

La peza sablo aperis en 1978. Formale laŭhumore ĝi estas absolute alia, la aŭtoro tie preskaŭ prikantas Sovetunion. Sed ĉar la baza temo havas neniun rilaton al politiko de USSR, oni povas taksiti iusenca ruzaĵo — Rybakov kvazaŭ petis legantojn (kaj, ĉefe, redaktorojn-cenzuristojn) ne heziti pri lia lojaleco. “Mi nek kredis nek kredas iun ajn dion. Ruso, judo, beloruso — por mi ne estas diferenco. Sovetunio edukis min internaciisto”, — preskaŭ en la unua paĝo deklaras la rakontanto, Boris Ivanovskij.

La romano montras la tragedion de la juda popolo per ekzemplo de simpla granda familio, loĝanta en trankvila urbeto de Ĉernigova provinco (prototipo: reala urbeto Ŝĉors) — do oni vidas, ke ne vane estis menciita ankaŭ la naskiĝloko de Rybakov... *La peza sablo* dividiĝas je du partoj, en la unua “ĉio estas bona” — la familio vivas kaj relative bonfartas, certe alfrontas diversajn malfacilaĵojn, foje eĉ la morton de proksimuloj, sed la ĝenerala humoro estas optimisma. Preskaŭ en la pleja mezo ĉio krute ŝanĝiĝas — komenciĝas la milito, la urbeton eniras nazioj kaj tuj komencas ekstermi la judojn.

Nun, kiam la tuta mondo vaste scias pri la holokaŭsto (nelaste dank’ al la konataj filmoj *La listo de Schindler* kaj *La vivo estas bela*), estus malfacile mirigi cinikan homon, kiu la unuan fojon prenis por legi *La pezan sablon*. Jes, ĉio estas la sama — getoj, limigoj, flavaj steloj, malsato, malsukcesaj provoj eskapi, poste amasa pafmortigo... Sed normalan homon neniu el tiaj historioj lasas indiferenta.

Krome meritas atenton malkutima por sovetia literaturo tuj videbla (eĉ intence vidigata!) paralelo inter *La peza sablo* kaj la Sankta Skribo. La epigrafo por la tuta romano estas verso el la *Genezo*: “Kaj Jakob servis pro Raĥel sep jarojn, kaj ili estis en liaj okuloj kiel kelke da tagoj, ĉar li amis ŝin”. La du protagonistoj de la romano estas Raĥil Raĥlenko, tre bela junulino, loĝinta en Ukrainio, kaj Jakob Ivanovskij, svislandano, kies prapatroj devenis el la samaj lokoj. Jakob kaj Raĥil ekamis unu la alian, kaj, spite al diversaj malfacilaĵoj, geedziĝis. Kompreneble la historioj el la *Genezo* kaj la romano de Rybakov tre diferencas, sed menci la Bibliion kaj aludi je simileco komence de verko estis tre kuraĝa ago.


Anatolij Rybakov estis tre talenta verkisto, li scipovis lerte plekti teman fadenon kaj teni streĉon ĝis necesa momento. Sed la ĉefa valoro de la menciitaj romanoj estas ke ili aspektas absolute versimilaj. Eĉ pli: se iu volas esplori la historion de la Ruslanda imperio kaj de USSR de 1900 ĝis 1945, oni povas legi nur *La pezan sablon* kaj *Infanojn de Arbat*, kaj preskaŭ ĉio iĝos klara. Neniu lernolibroj transdonas la etoson de la aŭtentikeco, kiun oni sentas, legante la romanojn de Rybakov.

Fine de sia vivo li okupiĝis plejparte pri socia agado — prezidis la sovetian PEN-centron (1989–1991), sekretariis en la Verkista Unio. Lia lasta verko, *Romano-rememoroj*, aperis en 1997. Sekvajare li forpasis en unu el novjorkaj hospitaloj.



“Monato”: Parolas posteulo de Maul

(*Monato*) Stefan Maul sinonimas kun *Monato*. Stefan kunfondis, formis kaj dum jardekoj ame flegas nian magazinon. Ĉefe legantoj, sed ankaŭ ĉiuj kunlaborantoj, ŝuldas al li multon. Sinceran dankon pro magazino unika en nia verda mondo: magazino, kiu raportas ne pri, sed per Esperanto, kiu intence turnas sin for de iufoje febra esperanta mondeto al iufoje same febra, sed multe pli vasta ekstera mondo. Stefan dediĉis sin multflanke al Esperanto, interalie kiel aŭtoro, poeto, akademiano, sed sendube *Monato* fariĝos lia monumento.



Nun, pro bonaj kaj kompreneblaj kialoj, Stefan decidis rezigni pri la ĉefredaktoraĵo. Ilin li transdonas al mi. Granda honoro, pri kiu mi ne tute certas, ĉu mi indas: la magazino perdas profesion, ĝisostan ĵurnaliston kaj akiras maksimume duonprofesion. Jes, mi instruas ĵurnalismon ĉe brita universitato kaj trejniĝis kiel ĵurnalista antaŭ pli ol 30 jaroj; intertempe, tamen, kaj plejparte, mi perlaboris mian ĉiutagan panon, instruante universitatnivele la germanan.

PRINCIPOJ

Sed, dum tiu ĉi periodo, mi kontribuis al *Monato*, artikolante kaj, iom poste, redaktante la rubrikojn *Politiko* kaj *Moderna vivo*. La magazino ebligis al mi, lingvo-instruisto, reteni kontakton kun la ĵurnalismo. Samtempe mi rekonis la valoron de *Monato*, pli kaj pli respektante ties principojn, kiujn nun kiel ĉefredaktoro mi defendos.

Kio pri la estonteco? Ŝanĝi nian magazinon mi ne volas; laŭeble plifortigi, jes. Por tio mi bezonas interalie la helpon de legantoj: legantoj, ekzemple, el landoj, kiuj malofte reprezentigas inter la kovriloj de *Monato*. Legantoj pretaj verki pri protestoj en Francio kontraŭ altigo de la pensiaĝo; pri la dekstrema tiel nomata tefesta partio en Usono; pri la provoj de Putin denove prezidantiĝi; pri la burleskaĵoj de Berlusconi ktp ktp. Ne mankas temoj, sed ie-tie mankas verkantoj por kvante kaj kvalite ŝveligi la enhavon de niaj rubrikoj.

Tiamaniere, kun via helpo, kun la subteno de Flandra Esperanto-Ligo, ni povos daŭrigi la *Monato*-tradicion grandparte establitan de Stefan Maul. Humile, iom nerveze, mi tamen antaŭĝuas sukcesan kaj fruktodonan kunlaboron.

Paul Gubbins

Laŭlum ricevis Dumvivan Honoran Premion pri Tradukado de ĈTA

(ĈIC) La 2an de decembro okazis en Pekino disdona ceremonio de la Dumviva Honora Premio pri Tradukado de la Ĉina Tradukista Asocio (ĈTA). Ĝi estas la plej alta premio de la ĉina traduka rondo. Kvin famaj ĉinaj tradukistoj, inkluzive de la Esperanto-tradukisto Laŭlum, ricevis la premion. Ĉeestis kaj faris paroladon en la ceremonio Li Zhaoxing, prezidanto de ĈTA kaj eksa eksterfera ministro de Ĉinio, kaj Zhou Mingwei, prezidanto de la Ĉina Fremdlingva Eldona Grupo.




La 87-jara Laŭlum estas eksa vicĉefredaktoro de *El Popola Ĉinio*, membro de la Akademio de Esperanto kaj Honora Membro de UEA. En lastaj jaroj li esperantigis multajn ĉinajn famajn klasikajn romanojn kaj novelojn kiaj *Ĉe akvorando*, *Pilgrimo al la okcidento*, *Romanoj pri la tri regnoj*, *Mirrakontoj de Liaozhai* k. a. Liaj kelkaj tradukaĵoj enlistiĝis en la Serion Oriento-Okcidento de UEA. Danke al lia kontribuo al la Esperanta literaturo UEA donis al li premion Grabowski en 2003.

En la ceremonio ricevis la premion ankaŭ ĉinŝtataneca uson-devena tradukisto Sidney Shapiro, angl- kaj franc-lingva poem-tradukisto Xu Yuanchong, rus-lingva tradukisto Cao Ying kaj angl-lingva tradukisto Tu An.

Chen Ji

Sur la foto: Prezidanto de ĈTA Li Zhaoxing (maldekstre) kaj prezidanto de la Ĉina Fremdlingva Eldona Grupo Zhou Mingwei (dekstre) donas la honoran diplomon al Laulum.



El “Mia Jarcento”

de Günter Grass

En 1999 aperis *Mia jarcento* de Günter Grass — cent mallongaj rakontoj, mozaikeroj de la dudeka jarcento. El malsamaj perspektivoj aperas malsamaj personoj: simpatiaj kaj malsimpatiaj, krimuloj kaj viktimoj, viroj kaj virinoj. Tiuj rakontetoj ligiĝas intime kun la germana historio, kaj finfine el la bunta ĥaoso aperas plena bildo de nia dudeka jarcento. Jam naŭ ĉapitroj el *Mia jarcento* de la nobel-premiito Grass aperis en *La Ondo de Esperanto*, elektite kaj tradukite de Wolfgang Kirschstein. Nun ni proponas la dekan eron, en kiu temas pri fikcia letero, verkita antaŭ cent jaroj.

1911

Mia kara Eulenburg¹, se mi ankoraŭ rajtas nomi vin tiel post la severa makulado fare de la gazetŝmirajoj de tiu kanajlo Harden², kiuj igis min grumblante obei al la ŝtata bonfarto kaj perfidi mian sincere fidelan vojaĝkunulon kaj amikan konsilanton. Tamen, kara princo, nun mi petas vin triumfi kune kun mi. Nun ĝi okazas. Hodiaŭ mi nomumis grandadmiralo flotministron Tirpitz³, kiu en Reichstag⁴ tre trafe riproĉis la maldekstrajn liberalojn. Ĉiuj miaj skizoj pri la formado de la floto, kies detalemon vi tiom ofte milde kritikis, ĉar mi dum tedegaj kunsidoj senlace ĝuis mian etan talenton kaj notis — por nia admono — sur dosierujoj kaj eĉ en tro sekaj dosieroj la batalŝipon “Charles Martel” de Francio kaj ties armitajn kirasŝipojn de la unua klaso, antaŭ ĉio “Jeanne d’Arc” kaj ankaŭ la nove konstruitajn en

Ruslando, ĉefe la armitajn ŝipojn “Petropavlovsk”, “Poltava” kaj “Sevastopol” kun ties pafilturoj kiel koncentritan mararmean povon. Kion ni povis kontraŭi al drednaŭtoj de Anglio antaŭ la leĝoj pri la floto liberigis niajn manojn? Eble kvar armitajn kirasŝipojn de la Brandenburga klaso — nenion plu. Sed tiu ampleksa skizaro pri la imagebla malamiko trovis nun respondon, kiel vi, kara amiko, povas lerni el la kunsendata materialo, ne plu estas projekto, sed plugas jam la Nordan kaj la Baltan Marojn aŭ estas en la ŝipkonstruejoj en Kiel, Wilhelmshaven kaj Dancigo.

Mi scias, ke ni perdis jarojn. Bedaŭrinde niaj uloj estis tre malkleraj en *rebus navalibus*⁵. Oni devis evoluigi en la popolo ĝeneralan movadon, eĉ entuziasmon pri marameaj aferoj. Estis bezonataj mararmea asocio, mararmea leĝo, kaj la angloj — aŭ, mi prefere diru, miaj amindaj anglaj kuzoj⁶ — helpis kontraŭvole, kiam ili dum la milito

kontraŭ la buroj, vi memoras, kara amiko, kaperis ĉe la orientafrika marbordo du el niaj vaporŝipoj tute kaj komplete kontraŭleĝe. Tiam estiĝis granda indigno. Tio helpis en Reichstag. Tamen mia eldiro “Ni germanoj devas kontraŭi la anglajn drednaŭtojn per niaj armitaj ”Neniontimuloj” kaŭzis iom da bruo. (Jes ja, kara Eulenburg, mi scias, mia plej granda tento estas kaj restas la novajagentejo Wolff.)

Sed nun surakviĝis la unuaj realigitaj revoj. Kaj poste? Tirpitz zorgos pri tio. Por mi restas la sankta plezuro ankaŭ estonte skizi batalŝipojn kaj armitajn kirasŝipojn. Nuntempe mi sidas antaŭ la skribotablo, kiel vi scias, sur selo, ĉiam preta por ataki. Post la kutima rajdado estas por mi matena devo en aŭdaca skizado surpaperigi nian ankoraŭ junan mararmeon fronte al malamika supernombro, sciante, ke Tirpitz, same kiel mi, fidus al grandŝipoj. Ni devas esti pli rapidaj, pli moviĝemaj, pli armitaj. La koncernaj ideoj flugas al mi. Dum tiu krea akto la grandŝipoj kvazaŭ faletas el mia kapo. Hieraŭ aperis antaŭ miaj okuloj la grandaj kirasŝipoj “Seydlitz” kaj “Blücher”, kaj poste ili eliĝis el miaj manoj. Kompletajn eskadrojn mi vidas aperi en batallinio. Ankoraŭ estas manko de batalŝipegoj. Nur pro tio submarŝipoj devos atendi, opinias Tirpitz.

Ho, se nur vi, mia plej bona amiko, estetikulo kaj ŝatanto de la artoj, estus kiel antaŭe proksima al mi! Kiom aŭdace kaj klarvide ni ekbabilus! Kiom fervore mi forigus viajn timojn. Jes ja, kara Eulenburg, mi volas fariĝi paca reganto, sed reganto armita...

Tradukis el la germana
Wolfgang Kirschstein

NOTOJ

1. Imperiestro Vilhelmo II (1859–1941) skribas ĉi tiun (fikcian) leteron la 27an de januaro 1911 al Philip Friedrich Alexander, princo de Eulenburg kaj Hertefeld, Grafo de Sandels (1847–1921), germana politikisto kaj diplomato, amiko de la imperiestro.

2. La ĵurnalisto Maximilian Harden (aŭtente: Felix Ernst Witkowski, 1861–1927) aperigis en 1906 la artikolon *Vilhelmo la Paca*. Harden asertis, ke princo Eulenburg kaj ties kunuloj influis la imperiestron en malbona maniero. Poste Harden akriĝis siajn atakojn, asertante, ke la rondo ĉirkaŭ Eulenburg estis samseksama kliko. En la posta skandalo princo Eulenburg perdis siajn ŝtatajn postenojn; ankaŭ la reputacio kaj influo de Vilhelmo II malkreskis.

3. Alfred von Tirpitz (1849–1930), la estro de la germana mararmeo ĝis 1916, la 27an de januaro 1911 ricevis la rangon grandadmiralo (Großadmiral). Tirpitz planis fortigi la mararmeon kaj tiel fariĝi konkuranto de Britio. Jam en 1891 Germanio konstruis kvar ŝipojn laŭ la modelo de la ŝipo *Brandenburg*.

4. Reichstag (la germana parlamento) decidis pri la konstruo de pli granda floto en 1898 kaj 1900 kaj denove en 1908 kaj 1910.

5. *Rebus navalibus*. Maraj aferoj, marnavigado (*lat.*).

6. Vilhelmo II mencias siajn anglajn kuzojn, ĉar la brita imperiestrino Viktorino estis lia avino. La kapero de la germanaj ŝipoj okazis fine de 1899 — komence de 1900.

Kvar etapoj de Iltis

Haupenthal, Reinhard. *Iltis: Ein Verlag, seine Geschichte, seine Werke = Iltis: Eldonejo, ĝia historio, ĝiaj verkoj.* — Bad Bellingen: Edition Iltis, 2010. — 76 p. — (Schriften zur Esperantologie und Interlinguistik; №17).


Diskutinte pri ĉi-jara temo de la kleriga rubriko *Nia trezoro*, ni fine elektis la Esperanto-eldonejojn, ĉar la Esperanto-eldonado estas samaĝa kun la lingvo mem. Bedaŭrinde, la eldonejoj ricevis malmultan atenton en nia movad-historio — *Enciklopedio de Esperanto* (1933) kaj *Esperanto en perspektivo* (1974) enhavas nur malmultajn informojn pri ili. Aperis nur du membiografiaj verkoj de eldonistoj: tiuj de la germano Teo Jung kaj la ruso Aleksandr Saĥarov. La rikolto ne estas abunda, kaj ĉi tial estas salutinda la ĵusa apero de la grandformata (A4) 76-paĝa libro pri la eldon-agado de *Iltis*.

Ĉi tiu libro, same kiel multaj eldonaĵoj de *Iltis*, estas dulingva, en Esperanto kaj en la germana, kio ebligas ĝian distribuadon kaj uzadon ekster Esperantujo.

Post la enkonduko Haupenthal prezentas la etapojn de sia agado. La eldonado sub la nomo Artur E. Iltis (registrita artista nomo) komenciĝis en 1968, kiam la 23-jara studento Reinhard Haupenthal ekhavis ideon eldoni kelkajn verketojn. Li unue reprenis la satiran primovadan artikol-serion *Kiel (mal) venkigi Esperanton* de Kanguruo el *Germana Esperanto-Revuo*. Sekvis kelkaj pliaj presoj.

La dua etapo (1975–1988) estas ligita kun la kultura aktivado en Sarlando (Kulturaj semajnfinoj, libro-servo, la revuo *Dialogo*, eldonado de libroj). En 1983 vide al la centjara jubileo de Esperanto estis lanĉita “Jubilea Eldon-Serio” kun kvin sekcioj: *Beletro originala*, *Beletro tradukita*, *Esperantologio*, *Interlingvistiko*, *Scienco*. En ĝi aperis 62 titoloj, eldonitaj plejparte de Sarlanda Esperanto-Ligo.

La tria etapo ligiĝas kun la nomo de la presejestro Ortwin Deubert, kiu sub la marko *Iltis-Verlag* (Iltis-Eldonejo) dum 1989–1996 aperigis 35 titolojn en “Iltis-serioj” kun la sama divido. En 1997 komenciĝis nova vivo de *Iltis* “sur propraj piedoj” kiel entrepreno de Irmu Haupenthal. Novan fokuson de la eldonejo formas titoloj de kaj pri Johann Martin Schleyer kaj Volāpuk. De la jaro 2007 aperas serio “Broŝuroj pri



esperantologio kaj interlingvistiko”, en kiu, kiel la 17a serio, aperis la recenzata libro.

Post la historio sekvas bibliografia parto, kiu prezentas kompletan liston de la eldonaĵoj en la alfabeto ordo de la aŭtoroj aŭ verkoj, se temas pri plur-aŭtoraj verkoj. Entute 260 bibliografiaj priskriboj, kun asteriske notitaj iom pli ol dudek titoloj formale aperintaj ĉe aliaj eldonejoj, sed kadre de la eldon-agado de *Iltis*.

Sekvas analizo de la bibliografio, unue, kronologia detaligo laŭ la kvar menciitaj periodoj. Due, laŭaŭtoro

detaligo kun indikoj pri landa aparteno, vivodatoj, originala aŭ traduka monografioj, kontribuoj al kolektivaj verkoj, la tuto tabelforme. Apartaj tabeloj por la tradukitaj aŭtoroj kaj la tradukintoj. Ĉeestas eĉ detaligo laŭ la jaroj de naskiĝo kaj morto, tiel la plej frua aŭtoro estas Molière (1622–1673) kaj la plej juna Esther Haupenthal (1970–). La plej multaj verkoj, kvindek tri, estas (kun)aŭtoritaj de Reinhard Haupenthal. Sekvas Karolo Piĉ (15), Johan Martin Schleyer (12), Wilhelm kaj Hans Wingen (12), Fernando de Diego kaj Henri Vatrè po 8.

La Iltisaj aŭtoroj estas el 33 landoj, plej multaj kompreneble el Germanio (46), sekvas Francio (17), Britio (14), Svislando (13), k.a. Aperas ankaŭ tabeloj de la serioj de *Iltis*.

En la libro estas priskribitaj aliaj aktivaĵoj ligitaj al *Iltis*, inkluzive de la Literatura Manifesto ‘87 de la Iltisa Skolo. Estas tuŝataj la rilatoj de *Iltis* kun la Praga Skolo, Schulz kaj la iberianoj. Pri la revuo *iltis-Forumo* (1989–1995) estas nur mallonga notico kun listigo de la kunlaborintaj aŭtoroj. Fine troviĝas referenc-listo.

La libro, donanta kompletan bibliografion de ĉiuj *Iltis*-titoloj kaj super-rigardon pri la *Iltis*-aŭtoroj estas valora kontribuo al la historio de la Esperanta kulturo kaj la bibliografia scienco.

Halina Gorecka

Pri la Esperanta novelarto en Tel-Avivo

Rekorde multnombra aŭskultantaro en Tel-Avivo kunvenis la 30an de novembro 2010 okaze de prelego de Giorgio Silfer pri la Esperanta novelarto. La vesperon organizis la ĉefa aktivulo en Tel-Avivo, Josi Ŝemer, kaj ĝin partoprenis esperantistoj el la tuta lando, inkluzive de Hajfo, Jerusalemo kaj Ber-Ŝevo. Interalie ĉeestis preskaŭ la tuta estraro de ELI, la landa asocio, kies prezidanto Amri Wandel oficiale bonvenigis la gaston.

La Tel-Aviva komunumo estas la plej granda en la israela Esperantio: ĝi havas regulajn kunvenojn kaj kursojn en kulturdomo; al ili lastatempe aldoniĝis la agrablaj kunsidoj ĉe kafejo *Esperanto* en la urbocentra strato Zamenhof. La kafejo proponas interesan menuon: rekomendinda estas la salato “Esperanto”, kun kaprina fromaĝo, nuksoj kaj legomoj.

Dum la lasta jardeko ELI spertis kvantan kreskon (inkluzive de aliĝo de arabaj israelanoj) kaj, danke al la luigo de propra apartamento, heredita el Isaj Dratwer, ĝiaj financoj estas ekvilibraj. La vastiĝo de la cirkvito de la aktivuloj ne kreskas samgrade kiel la bazo, kvankam ankaŭ novaj aperis, el diversaj generacioj. Rimarkindaj estas la junulara aktiveco naturamika, la okazigo de ĉiujara landa kongreso, la organizo de Azia Esperanto-Kongreso en majo 2012.

En sia prelego Silfer partoprenigis la publikon per laŭtlegado de literaturkritikaj biogramoj, kiujn li komentariis enfokusigante la temon laŭ literaturhistoria perspektivo. Estis tiel traktataj diversaj novelistoj (Julio Baghy, Raymond Schwartz, Ferenc Szilágyi, Reto Rossetti, Marjorie Boulton) el dekduo selektita de la preleganto: la publiko ricevis la tutan dosieron, kun la instigo mem profundigi siajn konojn.

HeKo

Multvizaĝa libro

Vizaĝoj: Novelaro 2000–2009 / Redaktis Leif Nordenstorm, Sten Johansson, Lena Karpunina, Perla Martinelli, Tim Westover. — Stockholm: Eldona Societo Esperanto, 2010. — 175 p.

De temp' al tempo en Esperanto aperas kolektoj de selektitaj (do supozeble, la plej bonaj) noveloj, el la tuta literaturo aŭ el aparta ĝenro aŭ regiono. Menciindas *33 rakontoj* (1964), *Trezoro* (1989), *Sferoj* (sciencfikcio, pluraj volumoj), *Tempo fuĝas* (1995, el "Monato"), *Vivo kaj morto de Wiederboren* (1998, humuraĵoj), *El ombro* (2008) k.a.

En 2001 aperis *Mondo*, el noveloj senditaj de aŭtoroj mem el la tuta mondo kaj poste selektitaj. Promesita dua volumo de *Mondo* ne aperis, kaj nun laŭ pli-malpli sama metodo kolektiĝis la novelaro *Vizaĝoj*. La laboron faris kvin redaktantoj el diversaj landoj. Kutime tiakaze redaktoroj agas 2–3-ope, do neeviteble rememoriĝas rusa proverbo pri sep vartistinoj kaj nezorgata infano... sed tion dume flanken.

La aŭtoroj estas plejparte konataj, kelkaj estas plurfojaj laŭreatoj de la Belartaj Konkursoj de UEA, sed estas ankaŭ tute novaj nomoj. Por la libro estis elektitaj 29 el 79 proponitaj kontribuadoj. La subtitolo "Novelaro 2000–2009" ne superfluas: la noveloj respegulas aŭ la nunan vivon, aŭ nunan literaturan modon. Kelkaj tamen estas "ekstertempaj".

Leif Nordenstorm en la antaŭparolo skribas, ke nur unu el la noveloj estis publikigita libroforme. Reale, krom *Ĉu vi scipovas ludi tomlandilon?* de Carol (indikite) libroforme aperis ankaŭ *Peco de kablo* de Bronŝtejn; *La unua de aprilo* de Gabrielli aperis jam en *Trezoro* (1989). Kelkaj pliaj noveloj aperis en revuoj.

La enkonduka eseo de Sten Johansson *La Esperanta novelarto dum 120 jaroj* estas vere valora, kun multaj gravaj informoj.


Mi jam menciis: esence la kolekto laŭ la principoj de la kompilado, laŭ la prezento ktp. similas al *Mondo* (KLEKS, 2001), eĉ se ĝi aspektas pli modeste. Ankaŭ la sama manko senteblas: kiel iu siatempe skribis pri *Mondo*, "kelkaj aŭtoroj rimarkindas nur pro sia ekzota deven-lando" (fakte, temas pri unu sama aŭtoro en ambaŭ

novelaroj)... Aliaj aŭtoroj estas delonge famaj; eble iamaj iliaj verkoj vere valoris, sed ĉi-kolektaj, ho ve...

Tenu la flamon brulanta! de Leen Deij — bagatel-humura rakonto pri amatora spektaklo en lernejo; *Dubo* de Vimala Devi — pri fiaskanta svatado; *Cirkvita perturbo* de Paul Gubbins — ne nomebla aliel ol deliraĵo; mistika hororaĵo *La violeta zontuko* de Giorgio Silfer — ne klaras, kiucele la aŭtoroj verkis tiujn pecojn kaj kial redaktoroj elektis ilin.

Rampo-lernejo de Gbeglo Koffi estas anekdoteca rakonto pri malfidela edzo. Tro bagatela por vera novelo kaj tro longa por simpla anekdoto.

Du mikronoveloj de István Nemere fakte temas pri nenio. Kompare kun tio, *Sep rakontetoj* de Jorge Camacho per nur po kelkaj linioj (foje — malpli ol tri!) igas leganton multe mediti...



Kelkaj aŭtoroj plu ekspluatas siajn ŝatatajn temojn. Iufoje tio eĉ bonas, sed ne ĉiam.

Mikaelo Bronŝtejn en *Peco de kablo*, kiel ĉiam, priskribas vivon de laboristoj en nordruslanda urbeto dum sovetia tempo, tiom insiste, ke leganto, mem ne vivinta en USSR, povas finfine kredi, ke ĉiu sovetia laboristo estis drinkulo, kaj ke sovetianoj vere ne rajtis fari eĉ unu paŝon sen sankcio de timegindaj sekurec-servoj.

Leif Nordenstorm en *Signoj dum ŝtormo* rakontas pri vivo de nordanoj en praantikva epoko, pri hazarda renkontiĝo de du junuloj el diversaj gentoj kaj la provo (sukcesa!) de interkompreniĝo. Eĉ en pratempo povis renkontiĝi ne

tribanoj de Lupo kun tribanoj de Boaco, "sed homoj kun homoj". Nu jes, iom naive, sed ĉiam plu aktuale, precipe nun.

Lena Karpunina en *Ordinara vizaĝo* prenis iom nekutiman por si temon — pri vivo ne en Sovetio, sed en Germanio (kie ŝi mem nun loĝas). Tamen, kiel ĉiam, ŝi skribas pri malfeliĉa suferanta virino, senlime tolerema. Kiel ĉiam, la aŭtorino celas, ke legantinoj larmetu finleginte... tamen la pli pensemaj espereble komprenos, ke eĉ krudkarakterata edzo meritas amon, ĉar iam nur li povas solvi seriozajn problemojn, kiujn virino trafas pro sia facilanimeco.

La inico de Ulrich Becker temas pri la unua seksa (geja) sperto de 18-jara knabo. La nuna modo postulas agnoski, ke tio estus "normala" kaj bona — sed ni vidas, ke nura kaprico de riĉa usonano (ja riĉaj usonanoj certas, ke la tuta mondo devas obei ilin!) neripareble perturbis la tutan vivon de la knabo, kaj lia futuro iĝis tre duba. Kiom pli feliĉa li estus sen tia "inico"...

Mao Zifu en *Unu monato* simple kaj sincere rakontas pri sia vivo. Por ni sanuloj malfacilas trasenti la suferojn de handikapulo, ne povanta moviĝi — kaj aliflanke, lian ĝojon pro veno de printempo, kaj lian ligitecon kun la tuta mondo dank' al Esperanto. Estas enmetita longa peco el artikolo pri li, supozeble aperinta en iu gazeto — temas ĉefe pri ebleco de geedziĝo de handikapuloj. Mao meditas pri amo kaj (ne)ebla edziĝo: "Ol certe imageblan rezulton fiaskan mi preferas nekomencon"...

Ĉu vi scipovas ludi tomlandilon? de Luiza Carol bone reprezentas la humanisman stilon de la aŭtorino, kvankam estas iom tro dolĉa kaj pro tio ne ver-simila.

Rulkreskaĵo de Tim Westover samstilas kiel liaj noveloj en *Marvirinstrato*, pri stranga fabela mondo, ĝi same vekas filozofiajn pensojn, diversajn en ĉiu leganto.

Kelkaj noveloj eble ne estas ĉefverkoj, sed legi ilin agrablas.

En *La urbo* de Massimo Acciai obstine ripetiĝas "Bruno ne havas urĝon, la urbo bone zorgas pri li", kaj nur lastfaze ĉio klariĝas. La ideo tamen tute ne estas freŝa.

En la ĉarma rakonteto *Rememoroj pri dolĉa patrino* de Ruben Feldman Gonzalez milda ironio poiomete transformiĝas en spritegan sarkasmon.

En *Pordo al la maro* de Sten Johansson temas pri vivodramo de apudmaraj loĝantoj, sed sen iaj konkretaĵoj, per nuraj aludoj.

Vivogumo de Geraldo Mattos — simpla skizeto pri vivo de brazilaj malriĉuloj.

Io devas okazi de Miĥail Korotkov — fantazia rakonto pri homo, kiu vivis sen maljuniĝi, kaj subite perdis tiun miraklan trajton ĝuste tiam, kiam al li ekbrilis espero pri onta feliĉo.

Raita Pyhälä en *Post unu vivo kune* iel daŭrigas la temon de Karpunina — pri zorgopleno de geedza vivo kaj ties celo. Ankaŭ ĉi tie virino opiniis sin malfeliĉa kaj revis divorci, kiam la infanoj plenaĝiĝos, sed...

La ŝtelo-manao de Sen Rodin estas pens-instigaj rememoroj de maljuna instruisto pri iam progresema eksperimenta lernejo kaj solvo de morala problemo.

Feliĉan Kristnaskon de Trevor Steele priskribas kelkajn horojn el la vivo de ordinara oficulo kun multaj problemoj, kaj tamen kun ioma espero je bona solvo.

Geedza ringo de Paulo Sérgio Viana rakontas pri internaj suferoj de virino, perdinta la ringon post multaj jaroj da geedza vivo.

Pri kelkaj noveloj — verkitaj de virinoj — mi ne sukcesis vortumi klaran opinion. Eble ĉar viro neniam komprenos virinan animon. Tiuj estas:

Iam, ne dimanĉe de Judit Felszeghy — historieto el vidpunkto de maljuna hundo.

La unua de aprilo de Lina Gabrielli — iom stranga interna monologo de amanta virino. Verŝajne talenta, sed ne trovinta resonon en mia animo.

Ŝtelisto Hadit kaj lia frato de Etel Zavadlav — stranga fabelo pri maljunigo de virino.

Kaj kelkaj noveloj estas vera trezoro.

Ducent mejloj ĝis Talooska de István Ertl estas la plej ampleksa kaj miaopinie la plej valora verko en la libro (indas akiri la tutan libron pro tiu novelo, kaj eble pro 2–3 aliaj). La moto: “Pri ĉia similo inter ĉi tiu historio kaj la realo

kulpas la realo”. Je li jam skribis tion... nu jes, en *La Postdomo*. Tamen alia frazo en la moto pensigas, ke ĉi-foje la realo vere kulpis tro. Komence iom tenaca, poste animskua rakonto — pri tio, ke nuna (okcidentkultura) homo estas tro katenita de diversaj reguloj, tro timema kaj malfidema antaŭ fremduloj, emas eviti personan respondecon... kaj el tio iam aperas fatalaj malfeliĉoj, kvankam ŝajne neniu kulpas. Pri tio, ke oni prefere ne forlasu kutiman loĝlandon (almenaŭ — ne faru tion senpripense). Kaj se oni tamen firme decidis migri — faru tion kun sobra menso, nepre lernu lingvon de la cellando kaj estu singardema, se vi ne plene komprenas ion.

Go-ludo de Christian Rivière estas vojaĝpriskribo, transformiĝanta en akran kontraŭmilitan pamfleton. Necesus traduki ĝin al amasaj lingvoj, ke homoj pripensu prezon de moderna usondevena “libero” kaj “demokratio”...

Nekrologo de Lenke Szász instigas al meditoj pri vera amikeco, pri tio, kiom diferencas reala homo kaj ties percepto far apuduloj. Eĉ al la plej bona amiko oni malfacile konfesas sekretojn profunde kaŝitajn en la animo... kaj vera amiko gardos tiujn sekretojn.

Kaj la jam menciitaj *Sep rakontetoj* de Jorge Camacho.

La librofinaj biografietoj videble estas kompilitaj haste, pro tio ili enhavas erarojn faktajn kaj gramatikajn. La lingva nivelo estas diversa: ekzemple, ĉe Karpunina ĝenas la ruseska sintakso kaj la uzo de “komisio” en la senco de “komisiono”. Ĉe iuj aŭtoroj troveblas brile trafaj esprimoj, kiel “molaj nuboj florbrasikaj” (M. Acciai), “urbocentraj turistomelkejoj”, “eks pri la bone konstruitaj amfrazoj de l’ iamo, nun celtrafas vortoj el ekster vortaroj” (I. Ertl).

En kelkaj noveloj tajperaroj oftas, en aliaj tute ne estas. Evidente ne ĉiu el la redaktoroj agis same respondece.

Do — ne tute kohera kolekto, kun vasta temaro kaj diversaj niveloj kaj stiloj. Tamen vere atentinda kaj liveranta adekvatan resumon de la Esperanto-literaturo 2000–2009.

Valentin Melnikov

Seminario pri la E-literaturo

Venu al la Universitato de Louisville, Louisville, Kentucky (Usono) por partopreni en unika Seminario pri la Literaturo de Esperanto sub gvido de: Ulrich Becker, poeto kaj eldonisto; Duncan Charters, lingvisto; Humphrey Tonkin, kritikisto; Tim Westover, novelisto.

Tempo: La seminario komenciĝos matene 26 feb kaj finiĝos tagmeze 27 feb. Ĝi parte koincidos kun la 39-a Konferenco pri Literaturo kaj Kulturo depost la Jaro 1900, organizita de la Universitato (<http://www.thelouisville-conference.com/>), kaj al kiu oni rajtas aliĝi kiel vizitanto kontraŭ \$10 tage.

Loko: Salonoj de la Universitato de Louisville.

Lingvoj: La lingvoj de la seminario estos Esperanto kaj la angla.

Tranoktado: Pri hoteloj vidu la repaĝaron de la konferenco (adreso ĉi-supre).

Aliĝo: \$35 (\$15 por studentoj). Bonvolu anonci vian deziron partopreni ĉe la organizantoj:

✉ bonnie.fonsecagreber@louisville.edu,

✉ tonkin@hartford.edu,

✉ chez.grebeli@gmail.com.



Konkurso pri infandeseĝnaĵoj

La Esperanto-klubo de Saint-Nazaire (Francio) organizas konkurson pri infandeseĝnaĵoj. Ni invitas ĉiujn instruistojn, kiuj deziras partoprenigi siajn gelnantojn al tiu konkurso.

Jara temo: Vojaĝantaj Popoloj, migrantaj Popoloj...

Formato: minimume 40×30 cm.

Kategorioj: A (ĝis 7-jaraj), B (7–10-jaraj), C (11–14-jaraj).

Limdato: la 10a de marto 2011.


Dorse de la desegnaĵo notu esperantlingve, nomon, aĝon de la infano, adreson de la lernejo aŭ de la Esperanto-klubo, kaj koncizan priskribon de la desegnaĵo.

Estos atribuitaj po 3 premioj en ĉiu kategorio.

Bonvolu sendi desegnaĵojn al Centre Culturel St Nazaire Esperanto ✉ 38, rue de la Croix Fraîche, FR-44600 Saint Nazaire, France.

Oni povas aboni *La Ondon* per pago al landa peranto (vd. p. 23), al nia UEA-konto “avko-u”, al niaj bankaj kontoj en Ruslando kaj en Pollando, al Yandex-denjgi. Ni ekuzis ankaŭ la sistemon PayPal, akceptante eŭrojn, dolarojn kaj zlotojn. Vidu pli rete: <http://www.esperanto.org/Ondo/>

Subgrunda Esperanto-muziko reaperas. En Ruslando



Dek jarojn post la apero de la kompilo *Esperanto Subgrunde* nova projekto estas en preparo por revigligo de punkaj, hardkoraj, krustaj, grinckoraj, brumuzikaj (nojzaj) kaj traŝaj Esperanto-bandoj sub la arta reĝisorado de Vladimir Kontraŭ el la Ruslanda urbo Ivanovo.

Lastatempe Vladimir serĉas kaj instigas bandojn el la punka kaj hardkora movado por partopreni per kontribuoj al nova tiustila kompilo.

Tio estas okazo por malnovaj bandoj reaperi por pli ampleksa malkovro, kiel ekzemple por la pola anarkipunka bando de Lukaso *Pendumito* <http://www.ipernity.com/home/34329> aŭ por la japana anarkikrusta bando *Voĉo Protesta* <http://vkontakte.ru/club19535209>.

Tamen Vladimir trovis novajn bandojn, kiuj strebas prepari kontribuojn en Esperanto por tiu nova projekto, temas ĉefe pri rusaj bandoj, kiuj estas ne papagaj, sed vere esperantistaj. Du el ili estas novaj kaj ankoraŭ neniam koncertis, kaj tri aliaj bandoj registros Esperanto-kantojn speciale por la kompilo.

Do, entute kvin bandoj.

Social Zero estas sufiĉe konata fortviolenta bando el Reutov, Ruslando. La basisto Miĉja estas komencanto. Ili unufoje registros kanton en Esperanto, speciale por la projekto <http://vkontakte.ru/club17141488>.

Nigra Kato <http://vkontakte.ru/club20785533> estas nova anarkipunka bando en Moskvo. Ĝi havas interesajn tekstojn en Esperanto, kaj ĝi jam komencis provludi. Ĉiuj kantoj de *Nigra Kato* estos en Esperanto. La kantisto, Nikolao Krjukov <http://vkontakte.ru/id19958124> estas sperta esperantisto. Krom li en la bando estas du Esperanto-komencantoj, unu el ili ludas ankaŭ en *Social Zero*.

Death Before Revolution bru(nojza) grinckora bando el Ivanovo, Ruslando. Ĉi tiu bando estas jam sperta. La bandanoj estas multlingvistoj. Verŝajne ili iam registros albumon en Esperanto, en la angla, en la latina, en la franca kaj en aliaj lingvoj. Sed ĝis nun iliaj kantoj estis kutime tute sen tekstoj, nur kun krioj: <http://vkontakte.ru/club2398440>.

Kacbatalo <http://vkontakte.ru/club19589778> estas la novkreata bando de Vladimir Kontraŭ el Ivanovo. Ĝi ankoraŭ ne estas kompleta, kaj plu estas serĉataj drumisto kaj basisto. Vladimir verkis jam multajn tekstojn kaj li mem estos la kantisto... Li esperas komenci provludojn en januaro aŭ en februaro 2011. *Kacbatalo* ludos kruston kaj stratpunken en Esperanto kaj en la rusa.

Mary Crimen estas alia bando, en kiu Vladimir Kontraŭ antaŭe gitarludis; ĝi ĉesis aktivi, sed ili intencas reregistri unu kanton en Esperanto, kiun ili havis.

Platano el *La Pafklik* ankaŭ partoprenos per hiphophardkoro.

Verŝajne aliaj bandoj aldoniĝos...



Ekzemple, dubindas ke *Piĉismo* rifuzos aliĝi al la projekto; tie estas la ĝusta medio, en kiu Glebo naĝas ... Parodonu ... blekaĉas ;-)

Krom tio Vladimir iniciatis la kreon de virtuala grupo "Punko en Esperanto / EsperantoKoro" ĉe <http://vkontakte.ru/club17961254>, kie eblas trovi referencojn al la Esperanto-Punkhardkora sceno: punko / hardkoro / metalo / nojzo (brumuziko) / roko en Esperanto.

Por kunligi tiun movadon Vladimir kaj Nikolao de *Nigra Kato* decidis starigi distribuejon-eldonejon *Hej hula!!* <http://vkontakte.ru/topic-17961254-23445741> kaj eĉ arigas materialon por eldoni Esperanto-fanzinon.

Punkroko reorganiziĝas anarkie kaj promesplene el Ruslando.

Hej hula!! Punkrokon al ĉiuj!!

Kompilita de **Flo** helpe de **Vladimir Kontraŭ**



Beletra Almanako, №7



Ĉi-foje la legantojn alparolas Probal Daŝgupto. La fako de originala prozo enhavas kvin mallongajn rakontojn de Steven D. Brewer, Nicola Ruggiero, Paulo Sergio Viana, Cindy McKee kaj István Ertl. Originala poezio ĉeestas per *La febrigo* de Bjørn A. Bojesen kaj du versaĵoj de Blazio Vaha.

En la traduka prozo estas la rakonto *Pachin* de la galego Xosé Neira Vilas en la traduko de Suso Moinhos, *La donaco* (*Kristnaska rakonto*) de César Mallorquí (el la hispana tradukis Antonio Valén) kaj tri minirakontoj de Enrique Uribe Carreño, kiujn tradukis el la hispana István Ertl. La hispana dramaturgo Juan Mayorga ĉeestas per *Tekstoj pri teatro* kaj teatraĵo *La biblioteko de l' diablo*, ĉiuj en la traduko de Jorge Camacho.

Ken Miner replikas al la teksto *Pri "liteRETuro"* de Radek Nowakowski, kaj Stanislavo Belov leteras pri la 7a BA. Riĉas la recenza fako. Jorge Camacho recenzas kvar poeziajn librojn de Mikaelo Giŝpling. Pri *Neokazinta amo* de Lena Karpunina skribas Anna Löwenstein. Gerrit Berveling prikonsideras la epopeon *Jerusalem liberigita* de Torquato Tasso. Pri la novelaro *Vizaĝoj* verdiktas Bjørn A. Bojesen. Sten Johansson recenzas la kolekton de Manuel de Seabra *Malamu vin, unu la alian* kaj la libron de la jaro 1934 *El la notlibro de praktika esperantisto* de Kenelm Sturmer. Jorge Camacho intervjuas Sten Johansson pri literaturo.

Sepdekon da paĝoj okupas Belartaj Konkursoj de UEA 2010. Unue, la rezultoj, plue la premiitaj verkoj kaj, fine, raporto de la Prezidanto de la BK, Humphrey Tonkin, kiu analizas la ĉi-jaran rikolton. Aparte atentinda estas la duobliĝo de prozaj konkursaĵoj kompare al la antaŭa jaro, kiu havas jenan klarigon: "La kaŭzo de tiu granda kresko estis la fakto, ke ŝajne pluraj konkursaĵoj venis de sama fonto en Rusio: grupo da homoj, kies rego de Esperanto estas konsiderinde malpli ol perfekta, kaj kies verka talento, eĉ se en kelkaj kazoj promesplena, ankoraŭ bezonas maturiĝon..." Nu, la tuta afero estas inspirita de unu persono, en 2009 tiu lavango da konkursaĵoj venis al *Liro*.

Dekunu fotoj de Berta de la Vega bele variigas la almanakon.

Halina Gorecka

Ricevitaj libroj

Hauptenthal, Reinhard. *Iltis: Ein Verlag, seine Geschichte, seine Werke = Iltis: Eldonejo, ĝia historio, ĝiaj verkoj*. — Bad Bellingen: Edition Iltis, 2010. — 76 p. — (Schriften zur Esperantologie und Interlinguistik; №17). — [Recenzoekzemplero].

Kozyra, Edward. *Esperanto-angla-pola vortaro*. Vol. 1. — Malbork: Wo-To, 2009. — 326 p. — [Donaco de Edward Kozyra].

Kozyra, Edward. *Esperanto-angla-pola vortaro*. Vol. 2. Indekso pola-Esperanto; Mini-frazaro: Vojaĝo. — Malbork: Wo-To, 2009. — 242 p. — [Donaco de Edward Kozyra].

Malovec, Miroslav. *Gramatiko de la ĉeĥa lingvo / Antaŭparolo de Petro Chrdle*. 2a eld. — Dobřichovice: KAVA-PECH, 2008. — 28 p. — [Donaco de KAVA-PECH].

Popova, Elena. *Rim-enigmoj / Antaŭparolo de Petro Chrdle*. — Dobřichovice: KAVA-PECH, 2009. — 56 p., il. — [Donaco de KAVA-PECH].

Schaeffer, Karl Heinz. *La Germana Esperanto-Biblioteko — 15 jarojn en la nova hejmo Aalen — Historio, aktuala stato, perspektivoj = Die Deutsche Esperanto-Bibliothek — 15 Jahre im neuen Heim in Aalen — Geschichte in Rückblick und Ausblick*. Aalen: Germana Esperanto-Biblioteko, 2003. — 28 p. — [Donaco de la Germana Esperanto-Biblioteko].

Ricevitaj gazetoj

Beletra Almanako. 2010/9; Dia Regno. 2010/3; Frateco. 2010/10; Ĝenerala Informilo. 2010/164; Heroldo de Esperanto. 2010/12,13; Kontakto. 2010/4; La Ondo de Esperanto. 2010/12; La Revuo Orienta. 2010/10; Literatura Foiro. 2010/247; Norvega Esperantisto. 2010/5; Spiritisma Esperanto-Informilo. 2010/142; Svisa Esperanto-Societo Informas. 2010/4; Verda Saksofono. 2010/28.

Literatura Foiro, №247

La 247a *Literatura Foiro* (oktobro 2010) buntas laŭ temoj kaj aŭtoroj.

La ĵusa literatura Nobel-laŭreato Mario Vargas Llosa estas unu el la akcentoj, unue per artikolo de Perla Martinelli pri ŝia renkonto kun li kaj pri lia verkista talento. La eseo *La fino de la mondo* de Leen Deij kvazaŭ daŭrigas la temon traktitan en la peco el ne tiom vaste konata verko de Vargas Llosa, *La milito de l' mondfino* (tradukita de Perla Martinelli).

Kaj originala literaturo, kompreneble: la aŭtuno ĉe-mara tra la okuloj de Bogusław Sobol, kaj aliaj poemoj el la plumo de Lenke Szász; premieras nova rakonto de Julian Modest. Zlatoje Martinov recenzas la faskon de hajkoj *Kardo sur kasko* de Ivanička Maĝarova.

Teatro: la dua kaj lasta akto de *Kvarteto* de Ronald Harwood, per la traduko de Giorgio Silfer, kiu kapablis tute fidele al la angla humurplena originalo adaptante ĝin al la esperantista subkompreno de la teksto.

En la numero aperas la tria kaj lasta parto de la eseo de Katharina Raabe *Kiam la nebulo leviĝis*, pri la evoluo de la literaturoj en Meza kaj Orienta Eŭropo depost 1989. Bojko Lambovski kompletigas la temon per sia kontribuado prezentita dum la regiona PEN-konferenco en Balĉik.

Vinko Ošlak recenzas per eminenta eseo la unuan kajeron de *Homarane*. Revenas interlude Radosław Nowakowski, ĉi-foje pri la produktado de unikaj libroj en nia lingvo.

Reveno de la Eta Princo, tiel kadre de la rubriko *Kultura agendo* Ljubomir Trifončovski titolis sian impreson pri la nova eldono de la tre ŝatata libro de Saint-Exupéry. **HeKo**

Monato
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

**Sendependa internacia
revuo en Esperanto kun
legantoj en 65 landoj!**

■ Politiko ■ Komputado ■ Scienco
■ Moderna vivo ■ Hobio ■ Sporto

www.monato.net

Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen
monato@fel.esperanto.be

Por la novembra tasko *Proverboj* venis 16 respondoj, ĉiuj ĝustaj. Ilin sendis: Karine Arakeljan (Armenio), Edmund Grimley Evans, Malcolm Jones (Britio), Marek Blahuš, Jindřich Tomášek (Ĉeĥio), Hans-Burkhard Dietterle, Edeltaut Henning (Germanio), Anna-Liisa Ali-Simola, Bruno Lehtinen (Finlando), Jackie Huberdeau (Francio), Stanisław Płachta, Hanna Skalska, Zbigniew Tytkowski (Pollando), Viktor Alikin, Svetlana Konjašova (Ruslando), Birgitta Anevik (Svedio), Keneĉjo Goldbergo (Usono).

Jen la trovendaj proverboj: “De guto post guto disfalas granito” kaj “Per pacienco kaj fervoro sukcesas ĉiu laboro”.

La loto donis libropremion al *Anna-Liisa Ali-Simola*. Ni gratulas ŝin!

Sudoku

Sudoku estas japana enigmo populara en la tuta mondo. Necesas plenigi la kampon per ciferoj de 1 ĝis 9 tiel, ke en ĉiu horizontala kaj vertikala linio kaj en la kvadratoj 3×3 la ciferoj ne ripetiĝu. La respondoj venu al la redakcio poŝte aŭ rete antaŭ la 15a de februaro 2011.

Komputile kompilis **Aleksej Korĵenkov**

		1			4	7		3
7				6			5	
		2	7		8			6
	9			4				
			3		9			
				5			2	
6			9		7	4		
	7			8				1
4		8	6			3		

Juda humuro

Anonctarifo

Ichak kaj Ŝlomo estis bonaj amikoj. Ŝlomo mortis. Ichak venis al la redakciejo de la loka gazeto por aperigi nekrologon. Li skribis sur la mendilo: “Ŝlomo mortis”.

La oficistino legis kaj diris al li: “La minimuma prezo estas por kvin vortoj”.

Post iom da pensado Ichak skribis: “Ŝlomo mortis. Mi vendas aŭton”.

Kies mono?

En eta urbo en Rumanio okazis monkolekta kampanjo por financi la rekonstruadon de la sinagogo. Multaj judoj alportis monon. Ankaŭ loka prostitutino venis kun mondonaco. La monkolektantoj ne sciis, ĉu ili rajtas ricevi la monon de la pekulino, kaj ili turnis sin al la rabeno.

— Rabeno, ĉu ne estas peko ricevi ŝian monon por nia sinagogo?

— Kial peko? Ĝi estas mono de niaj komunumanoj.

El la kolekto de **Josef Ŝemer**

Spritaĵ splitoj kaj preskeraroj

el la kolekto de reduktoro

Li neniam kontestas

Mi neniam konsentas. Novjorka intervjuo. [...] Mi neniam kontestas. (Intervjuo kun Ulrich Becker // *La Ondo de Esperanto*, 2010, №12. p. 20)

Zorga dommastrino, faldas re kaj re, sen fino

Louise Michel sin disfaldas en pluraj frontoj cele doni sencion al la ribelo... (Manuel de Seabra. *Louise Michel*, “la ruĝa Virgulino” // *La Kancerkliniko*, 2010, №136, p. 21)

Bakejoj kidnaptaj

... pro partopreni en manifestacio dum kiu oni forrabis tri panbutikojn, ŝi estis kondamnita al ses jaroj en karcero... (samloke)

Nelacigeble kaj memrecenze

La nelacigeblaj partoprenantoj, sub la energia kaj entuziasma gvidado de Katalin Kováts, havis neforgeseblan klerigsemajnon. (Katalin Kováts. *Triaĝuloj kun juna elano* // *Esperanto*, 2010, №7-8, p. 151)

Anatomie pri Kontakto aŭ: Kiel artikiĝas revuo

Mi konatiĝis kun [Kontakto]... en 2005... mi legis plurajn interesajn artikojn... (Roĝener Pavinski. *Intervjuo kun la nova redaktoro de Kontakto* // *Kontakto*, 2010, №4, p. 4; rimarkis Marek Blahuš)

La universveda lingvo

En etne homogenaj ŝtatoj kaj tre maldense loĝataj landoj kiel Svedio ĉiuj parolas la svedan kaj la anglan — do Eo ne estas necesa. Kaj la tria nacia lingvo estas la alkoholo. (Andreas Kuenzli. *Absurda diskuto*, 28 okt 2010, <http://www.liberafolio.org/2010/lingva-konflikto-en-sveda-esperantujo#1288305788>)

Markita ideologie

Sesdekokano, aktiva en Milano ĉe la studenta movado kiel markisto-leninisto, Gino Strada doktoriĝis pri medicino en 1978... (“Verdaj papagoj” de Gino Strada esperantigita // *HeKo* 457 6-A, 12 okt 2010, <http://www.esperantio.net/index.php?id=1486>)

Ne al glavo, aŭ: Eĉ ne guto malgranda

Multe pli grava ol sango de redaktoro estas decidi kiun rolon la revuo ludu... (Johan Derks, 7 sep 2010, <http://groups.yahoo.com/group/uea-membroj/message/17105>)

Laŭ luteranoj, general’ necesas

La Luterana tradicio generale sekvas la Rom-Katolikan biblion. (*Flanke je Jesuo. La Nova Testamento*. Vol. 3 / Trad. Gerrit Berveling. Zwolle: Voĉoj Kristanaj, 2010; rimarkis Ionel Oneț.)

Plukis **István Ertl**

Bonan novan jaron!

Perantoj de “La Ondo de Esperanto”

Argentino: Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla – 52, CP 5507 – Vistalba, Luján de Cuyo – Mendoza

Aŭstrio: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio: FEL, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen

Brazilo: BEL, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-900 Brasília-DF

Britio: EAB/Viv O’Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE

Bulgario: Georgi Mihalkov, “Nadejda” V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady

Danlando: Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø

Estonio: Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare

Finnlando: EAF / Päivi Saarinen, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Straße 9, DE-55129 Mainz

Hispanio: Luis Serrano Pérez, Font Nova 32, ES-08202 Sabadell

Hungario: HEA, Pf. 193, HU-1368 Budapest
KEA, p.k. 87, HU-1675 Budapest

Irlando: Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

Islando: IEA, p.k. 1081, IS-121 Reykjavík

Italio: IEF, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano
Višnja Branković, Via Parini 5, IT-34129 Trieste

Japanio: JEI, Waseda-mati 12-3 Sinzyuku-ku, Tôkyô-tu, 162-0042

Katalunio: KEA, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell

Koreio: KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703

Kroatio: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb

Kroatio kaj Slovenio: Višnja Branković (vd. Italio)

Latvio: Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga

Litovio: LEA, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C

Nederlando: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

Norvegio: Esperantoforlaget, Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo

Nov-Zelando: G.David Dewar, 28 Coventry Way, Long Bay, North Shore City, NZ-0630

Pollando: PEA, Aleja Wolności 37F/7, 33-300 Nowy Sącz

Portugaliao: PEA, Rua João Couto, 6, R/C-A, PT-1500 Lisboa

Ruslando: Galina Romanovna Goreckaja, RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205

Serbio: Dimitrije Janičić, Svetogorska 19, 11000 Beograd

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin

Sud-Afriko: Colin S. Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge 7441

Svedio: Lisbet Andréasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby

Svislando: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen

Usono: ELNA, P. O. Box 1129, El Cerrito CA 94530




Germanio. Aktivuloj de la Interkultura Centro Herzberg komence de decembro vizitis la faman Kristnaskan bazaron en Erfurt kaj enrigardis la kafejon *Esperanto* en la urbocentro. La gastoj el la Esperanto-urbo transdonis al la kafejo Esperanto-flageton, varbilojn, informilojn pri Esperanto. (ICH)



Japanio. En decembro centoj da esperantistaj kolektivoj festas la naskiĝdaton de Zamenhof. Ĉi-jare la festado komenciĝis en la japana urbo Maebaŝi, kie la 5an de decembro okazis kunsido de la loka societo, deklamado de Zamenhofaj poemoj, bankedo en restoracio kaj ekspozicio en la gubernia domo. (Hori Yasuo)




Radio. *Esperanto-Welle* (Ondo Esperanto) estas elsendo de la radiostacio Radiotreff 88,0 en Neubrandenburg. Ĉiuomonte oni preparas du unuhorajn programojn: unu pri Esperanto, kaj la alian pri iu temo. Ĉiu programo estas dufoje elsendata, kaj ĉiusemajne oni povas aŭskulti unu elsendon. (Werner Pfennig)



Aleksander Korĵenkov. *Zamenhof*
 Serio *Scio*, Volumo 9
 64 paĝoj, 6 eŭroj



Arthur Conan Doyle. *La ĉashundo de la Baskerviloj*
 Serio *Mondliteraturo*, Volumo 6
 168 paĝoj, 15 eŭroj



Dek libroj / Kompilis Aleksander Korĵenkov
 Serio *Nia Trezoro*, Volumo 1
 32 paĝoj, 4,50 eŭroj



Dek gazetoj / Kompilis Aleksander Korĵenkov
 Serio *Nia Trezoro*, Volumo 2
 32 paĝoj, 4,50 eŭroj